

1975 februaro

68-a jaro

n-ro 830 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



En 1976
Atena
patronos
la 61an UK
en Ateno

Vi trovos

Cetere, ĉu vi iam klopodis diveni la originon de la iom flirta kaj leĝera stilo de la linioj kiujn vi kutime trovas sur ĉi tiu loko en la revuo? Vi eble ne konsciis, ke kiam la redaktoro verkas la tekston por "Vi trovos", tiam ekzistas reala kialo por ĝoji, ĉar la numero estas pretita, oni ne plu pensas pri ĝi, oni direktas siajn zorgojn al la sekvanta numero aŭ alia plenumenda tasko. Havu do — bonvole — iom da kompreno pri la leĝereco de la tekstoj ĉi-lokaj kaj notu, ke la menciita ĝojo kutime ne rilatas la kvaliton de la koncerna revunumero, ĉar — pretere dirite — la redaktoro ankoraŭ neniam estis kontenta pri la numeroj ĝis nun produktitaj. Eble tiu malkontento eĉ bona estas!?

La novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA origine estas preparita laŭ petoj de la redakcioj de Radio Romo kaj Radio Varsovio, sed ankaŭ ni petis ĝian tekston, interalie, ankaŭ pro la fakto, ke la nuna prezidanto de UEA relative malofte verkas por nia revuo. Vian intereson en ĉi tiu numero sendube kaptos ankaŭ la raportoj pri gravaj sciencistaj kunvenoj en Novjorko kaj Budapeŝto. La tuta recenzorubriko ĉi-foje estas dediĉita al "Esperanto en Perspektivo", ĝuste kiel decas kaj licas.

Enhavo

- 21 La "Societo Zamenhof", kio ĝi estas? : Membrokategorio por la mecenatoj de la Movado (H. Tonkin)
- 22 Novjara mesaĝo de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio: La graveco de la idealo postulas plenan harmonion, Kunsido de la Estraro de UEA: Klopodoj sanigi la financojn de la Asocio
- 24 Oficiala Postkongreso 1975: Aarhus proponas ripozon
- 25 Nekrologo: Kirsten Zacho 1913-1975
- 26 Tri novjorkaj seminarioj pritraktis Esperanton: Forumo de fakuloj (Richard E. Wood)
- 28 Budapeŝta laborkonferenco de la Internacia Asocio pri Programita Instruado: Robbimat II, Magnocor kaj Progreso 1 (Z. Barcsay)
- 29 Recenzoj pri "Esperanto en Perspektivo" (G. Waringhien, V. Benczik, J. Pool, D. Blanke, K. Kurisu, J.C. Wells)
- 33 Laste aperis..., Antaŭ 50 jaroj
- 34 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso
- 36 TEJO-paĝo: Socia integriĝo, Kongreso de JEFO, Ŝanĝoj en GEJ, Prudenta paŝo
- 37 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 39 Oficiala informilo, Poŝtmarkojn sendu al la Centra Oficejo
- 40 Nekrologoj (H.J. Blokker, H. Dresselhaus, M. Lemme, H. Sielens, Z. Ŝibajama), Anoncetoj

La kovrilo

Atena, la brava kaj batalema diino de la antikvaj grekoj, ne troviĝas sur nia kovrilo sole pro la Internacia Jaro de Virino. La filino de Zeŭso — se kredi al legendoj — estis ankaŭ patronino de la greka ĉefurbo Ateno en kiu en la jaro 1976 okazos la 61a Universala Kongreso de Esperanto. En niaj venontaj numeroj ni dediĉos sufiĉe da spaco al la kongresaj urbo kaj lando de 1976, sed jam nun eblas noti, ke unu el la demandoj ligitaj al la 61a UK estas solvita — Atena konsentis patroni ankaŭ nian aranĝon, kiu okazos en ŝia majesta urbo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Membrokategorio por la mecenatoj de la Movado

Mecenata rilato al la kulturo, arto kaj scienco estis tipaĵo de la renesanca socio. Sed, ankaŭ poste, ankaŭ nuntempe en la moderna industria socio estas troveblaj mecenatoj, kiuj malavare apogas diversajn kulturajn entreprenojn. Tamen, la mecenateco preskaŭ nenie plu konserviĝis en la dimensioj, kiujn ĝi havis kaj ankoraŭ havas en la Esperanto-movado. Restos kiel enigmo solvenda de iu estonta historiisto – kiamaniere unu tuta internacia kultura movado sukcesis kaj ankoraŭ sukcesas komplete financi sian agadon el siaj propraj privataj monrimedoj? Kaj ĉion ĉi – ne por jaro aŭ jardeko sed preskaŭ por unu tuta jarcento! La kreigo de la "Societo Zamenhof" estas fenomeno pri kiu la nuna Esperanto-movado prave rajtas fieri.

ESPERANTO ŜULDAS SIAN EKZISTON al la sindono de la familio de la juna s-ino Zamenhof: sen ilia financa helpo la unuaj paŝoj de la juna movado estus almenaŭ prokrastitaj, eventuale eĉ ne okazintaj. La komencan periodon de Universala Esperanto-Asocio ni ŝuldas ne nur al la laboremo de Hector Hodler kaj liaj kolegoj, sed ankaŭ al lia financa apogo. La moderna UEA same kreiĝis parte dank' al la forta subteno de tuta aro da simpatiantoj, kies nomoj kvazaŭ respegulas nian nunan historion – Yelland, Dinslage, Henderson, Minnaja, Sonnenfeld, Carlén – kaj multnombraj aliaj. Multaj homoj, al kiuj tiaj grandaj donacoj estis neeblaj, tamen donis laŭ sia eblo, ekzemple per aliĝo al UEA kiel Membroj-Subtenantoj, kies pli altaj kotizoj helpis egaligi la spezojn de la Asocio kaj plivastigi ĝian agadon.

La volontula financa apogo estas esenca por la prospero de UEA. Tiel esenca ĝi estas, ke fojfoje ni emis akcepti ĝin kiel tute normalan fenomenon, ne agnoskante sufiĉe forte la specialajn streĉojn, kiujn ĝi reprezentas por multaj homoj.

El tiu konstato naskiĝis la ideo de Societo Zamenhof, kies fondon la Estraro de UEA proponis en aŭgusto, kaj kiu estis oficiale fondita de la Komitato, per granda plimulto de voĉoj, en septembro. Tiu nova societo anstataŭas la malnovan kategorion de Membroj-Subtenantoj.

Societo Zamenhof estas societo interne de la Asocio mem. Ĝiaj membroj konsistas el ĉiuj niaj grandaj financaj apogantoj. Oni aliĝas al la Societo en difinita jaro aŭ per donaco de iu granda sumo al la kaso de UEA, aŭ per pago de kotizo ekvivalenta al trioblo de la kotizo de Membro-Abonanto en la koncerna jaro. Aliĝinte al la Societo, oni ricevos de tempo al tempo rekte de la prezidanto de la Asocio informojn pri ĝia stato – informojn pli detalajn kaj pli ĝisdatajn ol tiuj, kiuj normale aperas en la Esperanto-gazetaro. Okazos

ankaŭ speciala akcepto por membroj de Societo Zamenhof ĉiujare en la Universala Kongreso. Ni kuraĝigos la membrojn de la Societo turni sin rekte al la prezidanto por ricevi aktualajn informojn aŭ fari sugestojn pri la Asocio.

Ni esperas, ke ĉiuj iamaj Membroj-Subtenantoj fariĝos nun membroj de Societo Zamenhof. La saman inviton ni direktas ankaŭ al ĉiu alia, por kiu tio eblas. Tiucele, ili pagu rekte al UEA, aŭ pere de niaj kotizperantoj, trioblan kotizon de Membro-Abonanto. Kontraŭ tio ili ricevos la revuon kaj Jarlibron plus ĉiuj privilegioj de membreco en tiu speciala Societo.

Tiuj, kiuj jam pagis sian kotizon por la nuna jaro, povos aliĝi al la Societo per alpago de la diferenco. Dumvivaj Membroj de la Asocio same estos bonvenaj kiel membroj de la Societo kontraŭ jara pago de duoblo de la nuna kotizo de MA. Kvankam la oficiala lingvo de la Societo kompreneble estas Esperanto, Societo Zamenhof akceptos ankaŭ aliĝojn de personoj simpatiaj al Esperanto, kiuj ne parolas la lingvon. Por tiaj personoj ni klopodos fari specialajn aranĝojn, tiel ke ili ricevu almenaŭ iom da informoj pri nia agado en lingvoj kompreneblaj al ili.

En la pasintaj kelkaj monatoj, nia Asocio ricevis de grandanimaj membroj plurajn neatendite grandajn donacojn. Tiuj donacoj estas indiko pri fido al la Asocio flanke de kelkaj niaj plej klarvidaj anoj, kaj ili estas bona aŭguro por la estonteco. Societo Zamenhof kvazaŭ formaligas la rolon de donacantoj en nia agado. Kiel tio, ĝi estas unu stadio en espereble granda financa kampanjo, kiun ni verŝajne proponos lanĉi en kaj ekster la Movado en la venontaj jaroj. Ni invitas vin ĉiujn aliĝi al la nova Societo Zamenhof, kiu honorigas ne nur la kreinton de nia lingvo sed ankaŭ tiujn ĉirkaŭ li, kiuj prezentigis tiun lingvon al la mondo.

Humphrey Tonkin

La graveco de la idealo postulas plenan harmonion

LA SITUACIO de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj la perspektivoj por la estonteco, estis neniam pli helaj ol ili estas nun, ĉe la sojlo de 1975. La progreso de Esperanto en ĉiuj medioj en la pasintaj kelkaj jaroj klare pruvas tion. La lingvo estas nun instruata en lernejoj en preskaŭ ĉiuj regionoj de la mondo, ĝi gajnas pli da atento kiel serioza esplorobjekto en niaj universitatoj, kaj la studado de lingvaj problemoj ĝenerale pliintensiĝas. Samtempe nia lingvo progresas en diplomatio, kiel pruvis ekzemple la impona reprezentiĝo kaj la aktiva intereso pri la lingvo flanke de diplomatoj en la Universala Kongreso en Hamburgo. Aperio de granda nova komerca vortaro en la tuj pasinta periodo estas unu indiko pri progreso en la komercista medio. En nacia politiko, la demando pri Esperanto fariĝis subite viva: multaj parlamentanoj en pluraj landoj (ekzemple Britujo kaj Italujo) prenis poziciojn favorajn al la utiligo de nia lingvo, kaj la nombro plialtiĝas. Oficiala interesiĝo pri Esperanto en plej altaj niveloj de la hungara registaro estis evidenta lastatempe, kaj similajn evoluojn ni vidis ekzemple en Suda Koreujo kaj Norda Vjetnamujo. Nia literaturo floras: novaj literaturaj premioj anonciĝas, kaj oni reorganizas la Belartajn Konkursojn; la eldonejo Stafeto, kaj eldonejoj speciale en Japanujo, daŭrigas sian gravegan agadon. Aparte kuraĝiga estas renoviĝo de aktiva intereso pri kongresoj kaj konferencoj: la Estraro de UEA havas antaŭ si plurajn invitojn de diversaj landoj por la Universalaj Kongresoj, kaj kelkaj landoj (ekzemple Aŭstralio) planas regionajn aŭ specialigitajn konferencojn. UEA lastatempe eldonis la kronan verkon de la unua periodo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Kun titolo "Esperanto en Perspektivo", ĝi liveras al ni la plej plenan kaj efikan faktaron pri Esperanto nun ekzistantan.

Malgraŭ la imponaj atingoj, la laboro kiu staras antaŭ ni estas grandega. La mondo eniras periodon de ekstrema perturbiĝo: tradiciaj aliancoj fendiĝas, internaciaj organizoj estas streĉitaj, la rilatoj inter nacioj ŝanĝiĝas kaj transformiĝas. La monda ekonomio suferas ekstremajn streĉojn. Kvankam ĉio ĉi malhelpas kelkrilate la agadon de Esperanto (speciale kiam temas pri la ekonomio), ĝi ankaŭ prezentas unikajn eblecojn. Pli ol kutime la nacioj sentas la barilojn kiujn prezentas la superflua rivaleco inter lingvoj kaj inter kulturoj. Alproksimiĝas la tempo kiam, kun la helpo de la parolantoj de Esperanto, la diversaj ŝtatoj komprenos, unufoje por

ĉiam, ke la lingva demando ne devus esti politika demando, kaj ke la adopto de unusola neŭtrala lingvo por internacia komunikado, kia estas Esperanto, forigus el la internacia medio la interbarakton de la lingvoj.

Ni sukcesos en tiu strebado por la adopto de Esperanto nur se ni estos pretaj. Malgraŭ iom grandaj atingoj en evoluigo de modernaj lerniloj en pluraj landoj (ekzemple Britujo kaj Germanujo), niaj kapabloj efike instrui Esperanton al grandaj amasoj da homoj bezonas plifortigon. Malgraŭ la relativa stabileco de la Universala Esperanto-Asocio kaj la diversaj naciaj organizoj, la financa situacio de nia movado restas tre serioza. Malgraŭ la relativa sukceso de niaj Universalaj Kongresoj, ilia rolo kiel ĉefaj forumoj de nia movado kaj kiel kulturaj manifestacioj bezonas pli aktivan pritrakton de nia membraro kaj niaj gvidantoj. Malgraŭ la pli vasta studado de la lingva fenomeno Esperanto, la temo bezonas multe pli da atento de seriozaj studentoj.

Estas evidente, ke ni venkos niajn problemojn kaj kaptos kaj ekspluatos okazojn kiuj sin prezentas al ni nur per plej efika kaj harmonia kunlaboro. Kiel vi scias, mi estas nova prezidanto de UEA. Mi deziras, ke mia prezidanteco estu periodo kiam la

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE UEA:

Klopodoj sanigi la financojn de la Asocio

LA KUTIMA jarfina kunsido de la Estraro de UEA okazis la 11an kaj la 12an de januaro 1975, en la Centra Oficejo en Rotterdam. Ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, la direktoro kaj la vicedirektoro de la CO. Dum la traktado de difinitaj eroj el la nekutime ampleksa tagordo (125 punktoj) al la kunsido estis invitetaj ankaŭ la librotenisto de la CO kaj s-ro U.J. Moritz, gvidanto de la Komisiono pri la Statuto de UEA.



Humphrey Tonkin: Ni venkos nur per harmonia kunlaboro.

esperantistoj reunuiĝos en spirito de toleremo kaj klarvido sub la neŭtrala standardo de nia ĉefa internacia Esperanto-asocio. La laboro antaŭ ni estas tro granda, kaj la idealo estas tro grava, por permesi al ni la lukson labori en iu ajn alia spirito ol plena harmonio.

La jubilea, 60a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, Danlando, fine de julio kaj komence de aŭgusto 1975. La programo estos

espereble sukcesa kombino de tradiciaj eroj kaj novaj elementoj, kaj de laboro kaj ripozo. Ni speciale emfazos la aktivan partoprenon de la kongresanoj en la diskutoj kaj decidoj, tiel ke ĉiu ĉeestanto sentu sin partoprenanto kaj ne simple aŭskultanto. En la Kongreso ni pritraktos demandojn gravajn por la estonteco de nia Movado, kaj ni esperas, ke multaj el niaj membroj (kaj aliaj) partoprenos la Kongreson, diros sian opinion, kaj ĝuos la gastamon de la dana ĉefurbo.

Mencio de la Kongreso memorigas min, ke unu el la specialaj atingoj de la Esperanto-movado estas nia tutmonda reto de komunikado. Per nia granda Esperanto-gazetaro, kaj per la radio, kie Esperanto fariĝis inter la pli gravaj lingvoj internacie elsendataj, tiu ĉi mesaĝo atingos ĉiujn partojn de la mondo. Samtempe ni estas intima Movado: oni senpere komunikas je ĉiuj niveloj. Nome de la Estraro de UEA, mi aparte petas vin ekzerci tiun kapablon, kaj sendi al ni viajn sugestojn, ideojn kaj petojn. Ni bonvenigos ilin.

Al izolitaj esperantistoj, samkiel tiuj en fortaj lokaj movadoj; al esperantistoj malofte aktivaj, samkiel tiuj kiuj multe aktivas; al parolantoj de Esperanto de ĉiu politika koloro, ĉiu socia tavolo, ĉiu nacia kaj kultura fono, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, kaj mi persone, deziras sanon, feliĉon, kaj grandajn novajn sukcesojn por Esperanto en 1975.

Zamenhof-Tago 1974

Humphrey Tonkin

NOTO DE LA REDAKTORO: La teksto de la “Nov-jara mesaĝo” estis planita por la januara numero de nia revuo, sed ĝi pro la kutima jarfina ŝtopiteco de la poŝto ne atingis nin ĝustatempe. Pro ĝia graveco ni tamen publikigas la tekston kun unumonata malfruo.

La temo, kiu dominis la januaran kunsidon de la Estraro estis la kompleksa financa problemaro de UEA. Ne nur, ke oni dediĉis plurajn horojn al klopodoj revizii kaj ekvilibrigi la buĝeton por 1975, sed oni dum la tuta kunsido denove kaj daŭre revenadis al la financa stato de la Asocio, kiun oni — kompreneble — traktos ankaŭ dum la venonta kunsido de la Estraro, planita por la 12a kaj la 13a de aprilo 1975. En unu el la sekvantaj numeroj de nia revuo vi legos apartan artikolon, kiu klopodos detale kaj dokumentite prezenti la nunan financan situacion de la Asocio.

Kvankam la CO ankoraŭ ne povis liveri jarfinan staton de la kontoj, oni ne havas grandajn esperojn, ke la jaro 1974 montriĝos malpli deficita ol 1973. Tamen, en tiu maro da financaj inkuboj eblis dum la kunsido noti du pozitivajn punktojn: Kvankam ankoraŭ restas pluraj malklaraĵoj, jam nun estas certe, ke la 58a UK en Beograd finiĝis kun granda financa profito; la bilanco de la 59a UK en Hamburgo jam estas tute preta kaj montras kompletan ekvilibron de la spezoj.

La Estraro definitive decidis, ke la 61a Universala Kongreso okazu en 1976 en Ateno. Krome, estas farita principa decido, ke la 62a UK en 1977 okazu en la islanda ĉefurbo Reykjavik. Pri kelkaj decidoj, kiuj koncernas la ĉi-jaran UK en Kopenhago, bv. legi sur la paĝoj 34 kaj 35 de ĉi tiu numero.

La leĝa neceso renovigi la Statuton de UEA antaŭ la 26a de aprilo 1976 intense laborigis la komitatan Komisionon pri la Statuto. Ankaŭ la Estraro dediĉis al tiu temo preskaŭ du horojn, sed revenos al ĝi ankaŭ dum la aprila kunsido kaj diskutigos ĝin en la kopenhagaj kunsidoj de la Komitato, samkiel inter la membraro de la Asocio.

Apartan lokon en la kunsido okupis la problemoj de la CO, kies oficistaro reduktiĝis al iom pli ol 7 tuttagaj oficistoj, kompare kun 11 en 1973 kaj 10,5 en 1974. Ĉar intertempe la taskoj plenumataj de la CO apenaŭ malkreskis, oni povas atendi pliajn raciigojn kaj reduktajn de la laboroj kun la celo, ke oni certigu kontinuecon en la ĉefaj taskoj kaj laboroj de la Asocio.

Aarhus proponas ripozon

Postkongresoj ne havas en sia programo kun-sidojn kaj prelegojn, ĉio turniĝas ĉirkaŭ ĝenerala klopodo kiel eble plej bele pasigi la postkongresan tempon. En Aarhus, la urbo de la ĉi-jara Postkongreso, oni jam planas serioze gajajn programojn por la periodo inter la 3a kaj 6a de aŭgusto 1975.

AARHUS estas unu el la plej malnovaj urboj en Danlando. Ĝi ekzistis longe antaŭ la kristana epoko kaj, verŝajne, ĝi tiam estis fiŝista vilaĝo, lokita ĉe la elfluejo de la rivereto "Aarhus Aa", kiu nun trafluas la urbon kaj laŭ kiu la urbo havas sian nomon. En la antikva skandinava lingvo oni skribis tiun nomon "Aros" (t.e. "riveretelfluejo"), pli malfrue "Aars" kaj tiam laŭ platgermana skribmaniero "Aarhuus".

En 948 la urbo estis episkopa sidejo. La unuaj privilegioj estas donitaj al ĝi en 1441 kiam ĝi estis la urbo de la dana reĝo Kristoforo de Bavarujo.

Aarhus ofte suferis pro incendioj kaj dum longa tempo stagnis. En la 18a jarcento la urbo iom post iom mal-progresis, kaj en la jaro 1801 ĝi havis nur ĉirkaŭ 4000 loĝantojn. Sed de tiam ĝi malrapide kreskis ĝis la mezo de la jarcento. Tiam la kreskado rapidiĝis. La kaŭzo estas precipe la konstruo de la bonega haveno en la mezo de la pasinta jarcento kaj la malfermo de la granda orientjutlanda fervojlinio en 1862. La urbo fariĝis centro por la komercado en la tuta Jutlando kaj ĝi nun posedas ankaŭ gravajn fabrikojn.

Hodiaŭ Aarhus, ĉ. 200 000 loĝantoj, estas grava centro por edukado, kun universitato, altlernejoj por instruistoj, inĝenieroj, komercistoj, ĵurnalistoj, dentistoj ktp. Sed ĝi estas samtempe industria urbo — sufiĉe grava laŭ danaj cirkonstancoj.

La enloĝantoj de la urbo volonte prezentas la urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon al gastoj. Oni fieras pro la bela situo ĉe la golfo, pro la arbaroj kun altkreskaj fagarboj ĝis la rando de la marbordaj deklivoj, sed ankaŭ pro la diversspecaj parkoj. La loĝantoj de Aarhus veturas aŭ promenas tie dum la tuta jaro. Ĉiu sezono havas sian specialan belecon, kaj la elrigardo trans la maron de la altaj deklivoj estas aparte ŝatata. En la arbaroj situas restoracioj diversspecaj — de simplaj akvomuelejoj el malnova tempo ĝis modernaj restoracioj en internacia stilo.

Aarhus konstruigis straton nur por la urbaj aŭtobusoj tra parto de la centro kaj fermis la ĉefan straton, Søndergade, kaj poste la paralelstraton, Frederiksgade, por veturantoj, tiel ke nun tie estiĝis ĉarmaj korsoj kun floraranĝoj, skulptaĵoj, fontanoj kaj trotuar-restoracioj. Oni povas trankvile iri kaj rigardi ĉion aŭ sidi sur unu el la multaj benkoj kaj lasi la aliajn preteriri. Turistoj, gastlaboristoj kaj studentoj de la vasta terglobo preterpasas vin. Kampanoj, komercistoj, junuloj kaj maljunuloj de urbo kaj lando — kaj foje ankaŭ la reĝino Margrethe — intermiksiĝas. Sed la vigleco tie parte ĉesas kiam la butikoj vespere fermas la pordojn. Vespere oni trovas alian medion en la stratetoj ĉirkaŭ la teatro en la malnova parto de la



"La Malnova Urbo" estas subĉiela muzeo en la kadro de la Botanika Ĝardeno de Aarhus. Temas pri kolekto de ĉ. 50 domoj el ĉiuj partoj de Danlando, kiuj estas ankaŭ meblitaj tiel, ke ili ilustru la urban civilizon de ĉi tiu mondparto.



Rendevuo kun la dana maro estas ĉiam aparta travivaĵo. La eterna ludo inter la akvo kaj sablaj dunoj, kiujn la maro konstruas kaj malkonstruas alterne kaj eterne, estas ĉiufoje kvazaŭ nova sperto kaj vidinda spektaklo.

urbo. Tie ariĝas gastejoj kaj restoracioj tre divers-specaj kaj speciale allogaj por la gejunuloj.

Por konatiĝi kun la urbo okazos rondveturo en la unua tago de la Postkongreso.

Aarhus havas nek la “Ĉielmonton” nek la bordon de la Norda Maro. Tial en alia tago de la Postkongreso okazos du ekskursoj — samtempe. Unu kondukos la kongresanojn al la bela mezjutlanda regiono ĉirkaŭ la “Ĉielmonto”, Himmelbjerget, kaj al la apuda urbo Silkeborg, kiuj situas meze inter lagoj kaj arbaroj. La plej longa rivereto de Danlando, Gudena, interligas la multajn lagojn. Laŭ vojoj serpentumantaj tra belaj pejzaĝoj vi venos al Silkeborg, de kie boatoj portos vin tra idiliaj pejzaĝoj al la piedo de Himmelbjerget. De la pinto vi havos unikan vidaĵon super la lagoj kaj la meza Jutlando. Laŭ aliaj vojoj vi revenos al Aarhus.

Alia ekskurso kondukos la kongresanojn al la okcidenta Jutlando kaj al la bordo de la Norda Maro. En unu tago vi iros de la grasa orienta Jutlando, tra la meza Jutlando, kun vizito en Silkeborg (i.a. en muzeo kun malnovaj danaj glasoj. Tie vi eble povos vidi ankaŭ la 2000-jaran Tollund-viron), al la magra okcidenta Jutlando kun la najbara maro. Eble vi vidos trankvilan maron, eble maron en ŝtormo kun ventodancado en la sablo, tiel ke la dunoj aliformiĝas, estiĝas aŭ malaperas. Sed ĉiam estas travivaĵo renkonti la maron tie.

La kunlaborantoj de la Postkongreso faras sian eblon por agrabligi vian restadon en Aarhus kaj plezurigi vin.

Petu aliĝilon kaj Esperantan broŝuron pri Aarhus kaj aliĝu! Bonvenon al Aarhus!

Adreso de la Postkongreso:

Hørmarksallé 5, DK-8240 Risskov, Danlando.

Nekrologo

Kirsten Zacho

1913-1975

EN KOPENHAGO, la 17an de januaro 1975, en la aĝo de 61 jaroj, forpasis s-ino Kirsten Zacho, kiu estis unu el la plej elstaraj aktivuloj en la dana Movado post la Dua mondmilito. S-ino Zacho estis unu el la kunfondintoj de Kleriga Konversacia Klubo (fondita en la jaro 1952, poste kunfandiĝinta kun la kopenhaga Studenta Esperanto-Klubo), kiu dum multaj jaroj apartenis al la plej viglaj Esperanto-societoj en la mondo. En tiuj jaroj la klubo funkciigis ankaŭ la Esperantan eldonejon “Koko”, kies animo denove estis s-ino Zacho. Kvankam grave malsana

dum pluraj jaroj, s-ino Kirsten Zacho neniam ĉesis aktivi en la loka Movado: ĝis sia morto ŝi funkciis kiel prezidanto de KKK kaj ankoraŭ en la decembra numero de la kluba bulteno *Kuriero* verkis la ĉef-artikolon kaj inviton por la jara ĉefkunveno de la klubo.

Dum kelkaj jaroj, s-ino Zacho estis ankaŭ komitatano de UEA, kaj en la jaro 1962 funkciis kiel vic-prezidanto de la LKK de la 47a Universala Kongreso en Kopenhago. Kiam en la jaro 1958, la tiama redaktoro de nia revuo W. Auld malsaniĝis, s-ino Zacho havis la kuraĝon provizore transpreni la redaktadon de *Esperanto*, unue kun s-ro H.V. Rasmussen, kaj poste sola. Tiu “provizoreco” tamen daŭris pli ol du jarojn, ĝis la fino de la jaro 1960, kiam la redaktadon denove transprenis W. Auld. Ankaŭ tiun ĉi taskon s-ino Zacho plenumis zorge kaj atente. La morto de s-ino Kirsten Zacho signifas grandan perdon ne nur por la kopenhaga kaj dana, sed ankaŭ por la internacia Esperanto-movado.

Forumo de fakuloj

LA 89-A JARA KONGRESO de MLA (Modern Language Association, la Modernlingva Asocio de Usono), kunvenis en du luksaj novjorkaj hoteloj, Hilton kaj Americana, inter la 26a kaj la 29a de decembro 1974. Jam la trian fojon kunvenis la seminario "Esperantaj lingvo kaj literaturo"; la duan fojon okazis la seminario "Interlingvistiko". Sen-depense, laŭmemore la unuan fojon ĉe MLA, referaĵo ĉe alia seminario, neniel organizita de esperantistoj, bazis teorian lingvistikan esploron ĉefe sur lingvaj ekzemploj el la Internacia Lingvo. Tio lasta estas bona ekzemplo de interesiĝo pri Esperanto de neesperantistaj rondoj de lingvistoj, pedagogoj kaj literatursplorantoj en Usono. Al tiu evoluo certe kontribuos la fakto, ke la venonta jarkunveno de MLA okazos en San-Francisko, urbo kun jam establita tradicio de Esperanto en universitata edukado (la konataj someraj kursoj ĉe Ŝtata Universitato de Kalifornio, instruitaj jam kvin sinsekvajn jarojn de William Auld). La movadanoj tie, kun tiu sperto kaj tiu de la Post-kongreso de UEA (aŭgusto 1972) jam nun komencas planadon pri la ĉeesto de MLA en sia urbo, de la 26a ĝis la 29a de decembro 1975. Jen resume la programo de la tri seminarioj:

Lingvo kaj literaturo. Kvankam ĝi ja inkluzivas lingvo-instruistojn kaj teoriajn lingvistojn/filologojn, MLA estas grandplimulte literatura organizo. La plej granda unuopa membrokategorio estas tiu de la profesoroj de angla/usona literaturo.

La ĉi-jara prezidanto de la seminario, d-rino Margaret Hagler (Kolegio Lincoln Land, Illinois), laŭ la voĉdono de la pasintjara (ĉikaga) kunveno, dediĉis la programon al la temo "Kiujn verkojn devus enhavi esperantlingva antologio de la usona literaturo de la 20a jarcento?". La klarvida politiko de allogo de neesperantistoj, aktivaj esplorantoj de la usona literaturo, kondukis al la sinprezento de kvar referantoj, kiuj ĝis tiam estis fremdaj al la Esperantomovado. Ili frontis ĉefe la demandon de reprezenta usona antologio, dualoke la demandon pri ties esperantigo. Tiel, la novaj prelegantoj kaj seminarianoj unuafoje konfrontiĝis kun la koncepto de Esperanto kiel perilo de la literaturo.

Kvankam ne ĉiuj prelegoj estis klare rilataj al la problemo de Esperanta traduko, de prezentado de la materialo al esperantlingva legantaro, tamen per postprelega diskuto kaj antaŭ ĉio per prelego de sola neusonano, nemembro de MLA, ĉiuj partoprenantoj klare ekvidis la duan flankon de la antologia temo — ne la nura elekto de taŭgaj eroj, sed ankaŭ la trejnado de taŭgaj tradukistoj kaj la envicigo de la planata

Usona antologio en la jam riĉan tradicion de esperantaj antologioj pri nacilingvaj literaturoj. Temas pri la prelego preparita de William Auld "Poezio en la planata Esperanta antologio de usona literaturo". Pro la neĉeesto de Auld, la referaĵon — anglalingvan, kiel la ceteraj — parte laŭtleĝis, parte prikomentis prof. d-ro Richard E. Wood (Estro, Fakoj pri lingvoj kaj internaciaj studoj, Universitato Adelphi, Novjorko). Auld priskribis la ĝisnunan stokon de eldonitaj Esperantaj tradukoj de la usona poezio. Ĝi estas, laŭ li, nereprezenta, ĝenerale neglektinda. La plej bonaj tradukoj, tiuj de poetoj de la 20a jarcento, restas neeldonitaj, ĉefe, verŝajne, pro kopi-rajtaj problemoj. Antaŭ ĉio, la gusto de la tradukintoj kaj ilia elekto estis eksmoda, fremda — eŭropa, ne usona. Do, oni povas kaj devas fari la laboron dekomence. Kiel anglalingvano, sed skoto, Auld faris konkretajn sugestojn; li insistis, ke ĉio, ankaŭ vort-

Prof. d-ro Julius Balbin (sur la apuda foto), d-rino Margaret Hagler kaj prof. d-ro Richard E. Wood: Kiel tuta plejado da junaj lingvistoj en Usono, ili atingis, ke la Internacia Lingvo fariĝu konsista parto de iliaj ĉiutagaj studoj ĉe la kolegioj kaj universitatoj en kiuj ili lekcias.



ludoj, estas tradukebla; li aludis al siaj spertoj dum la kompilado de *Angla Antologio*. Nur denaska usonano, tamen, rajtas elekti reprezentan antologion.

Due parolis prof. d-ro Dennis Q. McNerny (Fako de Angla Lingvo, Universitato Bradley, Illinois), pri "Esperanto-antologio de la usona literaturo de la 20a jarcento". Li prezentis proponon pri plena enhavo kaj liston de tradukendaj verkoj, prozaj kaj poeziaj, de 31 aŭtoroj. Prof. McNerny diskutis la ecojn de bona antologio. Kompare kun la *Angla Antologio* de Auld kaj Rossetti, (ĉ. 300p.), samformata usona libro, laŭ la elekto de McNerny, ampleksus ĉ. 400 paĝojn. En la posta diskuto, prof. Julius Balbin parkere listigis la nomojn de pli ol cent gravaj usonaj poetoj de la nuna jarcento, prisilentitaj de McNerny. Sekvis la prelego de prof. John N. Hunter (Univ. de Kolorado, Boulder) "Pura nun pli pura aero: la

Paradiza rakonto de Willa Cather". La personan elekton de plej ŝatata verko Hunter defendis el diversaj starpunktoj. Hunter, okcidentusonano, volus per la *Rakonto de Tom Outland*, verkita de Willa Cather, prezenti al tutmonda legantaro la etoson de la vilaĝo en la dezerto de Novmeksikio kie okazas la rakonto. Estas antaŭvideblaj problemoj de traduko de okcidentaj dialektaĵoj.

Kvare parolis poetino kaj tradukistino el la jida, Miriam Hershenson, pri "Muriel Rukeyser: Grava nuntempa poeto". La prelegantino vidis en la poezio de Rukeyser la Zamenhofan spiriton de homamo kaj pacbatalo. Rukeyser priskribis la vivon de ministoj, siajn spertojn en malliberejo pro kontraŭmilita aktivado.

Fine prelegis d-ro Arthur Jasspé (membro de Ligo de Dramaturgoj kaj de "La Ŝafidoj", artista grupo novjorka) pri "De rerum dramaticum: Usonaj teatraĵoj por traduko Esperanten". La intermilita periodo, 1920-1940, provizas 18 dramojn, ĉiuj ege sukcesaj en novjorkaj teatroj. Objektive elektitaj laŭ la daŭro de la surscenigo (de 112 ĝis 2327 okazoj), ili prezentas la etoson de tuta Usono.

Resume, konstanta komitato de redakcio de *Usona Antologio*, sub la prezidado de d-rino Margaret Hagler, daŭrigos la klopodojn de la prelegintoj. Kiel



prezidanto de la seminario en San-Francisko, elektigis unuanime prof. Dennis McNerny. Proponojn pri la temo de tiu kunsido, kaj referaĵojn, oni sendu al li, ĉe Dept. of English, Bradley University, Peoria, Illinois 61606, Usono.

Interlingvistiko. La kunvenon prezidis prof. d-ro Julius Balbin (Kolegio Graflando Essex, New Jersey). Inter la ĉeestantoj oni notis multajn lingvistojn. Ĉeestis ankaŭ s-ino Sturgis, filino de la forpasinta s-ino Mary Morris, kiu siatempe aktive mecenatis la agadon de IALA (Internacia Helplingva Asocio) en Novjorko, ĝis ties likvidiĝo en 1950, kun la elekto de Interlingua kiel preferata sistemo kaj la aperigo de lernolibro pri ĝi. Kvankam la elektita temo estis "Interlingua kaj la parolantaro de Esperanto", neniel okazis polemiko inter la esperantistoj (granda plimulto de la ĉeestantoj) kaj la du-tri reprezentantoj de

Interlingua. Male, la lastaj klarigis, ketemas pri pasiva lingvoprojekto por sciencaj, legaj celoj, dum ili agnoskas la socian bazon kaj realan paroleblecon de Esperanto.

Unue parolis prof. Jacob Ornstein (Fakoj de lingvistiko kaj fremdlingvoj, Univ. de Teksaso, El Paso), nacie konata verkisto kaj simpatianto de Esperanto, pri "La faktoro de persona sinteno al internacia planlingvo". Li aludis al antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto sed samtempe al la nuna evoluo de respektinda, profesia esplorado en la kampo, kiu iom post iom ridindigas la antaŭjuĝojn. Li apelaciis por daŭra laboro en la kampo de la sociologio de la Esperanto-movado, la lingva diskriminacio, la pedagogio kaj lingvistiko de la Internacia Lingvo. Sekvis referaĵo de s-ro Frank Esterhill (direktoro, Interlingua Institute, — doktoriĝa kandidato pri klasika filologio ĉe la Universitato Columbia, Novjorko.) "Interlingvistiko: Kelkaj historiaj perspektivoj". La prelego estis iasence reverkaĵo de tiu de s-ro Esterhill, prezentita dum la pasintjara seminario en Ĉikago, sed ne plu polemika, pli scienca, kaj sen rektaj atakoj kontraŭ Esperanto. Ĝi prezentis historion de la interlingvistika movado el la vidpunkto de Interlingua, do emfazante skismojn kaj reformprojektojn en Esperanto kaj traktante Interlingua kiel kulminon de evoluo al naturalismo kaj senpera legebleco de teksto teknika/scienca, al edukita eŭropano, almenaŭ latinidlingva. Tamen ankaŭ ĝi estas plibonigebla. Pri la historio de IALA iom parolis s-ino Sturgis.

Fine parolis prof. d-ro Richard E. Wood. Lia referaĵo, "Vortoklaso kaj Inflektado en Esperanto", fakte pli taŭgus, kiel li mem diris, por kunveno de teoriaj lingvistoj, tamen li ĝin prezentis, aparte por la kritiko de la lingvistoj ĉeestantaj. Bazante sin sur laboro de Nogueira kaj Blázquez, Wood distingis inflektadon disde derivado. Inter la reagoj oni notis tiun de Mark Mandel (kandidato pri lingvistiko, Universitato de Kalifornio, Berkeley) kaj de d-ro William Solzbacher (Voĉo de Ameriko, Vaŝingtono) kiu prezentis la "tradician" starpunkton, ke Esperanto ne estas infleksia sed aglutina lingvo kaj, ke la kategorioj, distingitaj de Wood, fakte ne ekzistas. Oni konsentis daŭrigi la seminarion ankaŭ en San-Francisko, kaj la respondecon pri la planado de ĝia programo portos d-ro Jacob Ornstein. (Oni skribu al li ĉe Dept. of Linguistics, University of Texas at El Paso, El Paso, Texas 79999). Ebla temo estos "Kiel plue igi la studon de Esperanto respektinda en la okuloj de lingvistoj, pedagogoj, ktp."

Aplikita lingvistiko. Inter la tri prezentitaj referaĵoj ĉe la ĝenerala seminario "Aplikita lingvistiko" oni notis, ke unu prelego, tiu de prof. d-ro Pierre Cintas (Universitato Virginia, fakoj de franca lingvo kaj lingvistiko), uzis ĉefe ekzemplojn el la Esperanta korelativa tabelo en sia prelego "Kontrasta analizo kaj leksikigo".

R. E. Wood

ROBBIMAT II, MAGNOCOR kaj PROGRESO 1

LA LABORGRUPO Interlingvistiko kaj Lingvo-kibernetiko (germane: Interlinguistik und Sprachkybernetik – ILUS) de la Internacia Asocio pri Programita Instruado (Internationale Gesellschaft für Programmierte Instruktion – GPI), kun centro en la Okcidenta Berlino, kunlabore kun la Hungara Esperanto-Asocio aranĝis sian 4an laborkonferencon la 3an de januaro 1975 en Budapeŝto. La unuan fojon okazis laborkonferenco de ILUS eksterlande, kies antaŭaĵo estas, ke en aŭgusto 1974 la estro de ILUS, s-ro Hermann Behrmann, vizitis Hungarion por estigi kontakton kun scienculoj, kiuj poste aliĝus al la komuna laboro de la Asocio. La rezulto de la somera vizito estas la nuna konferenco, kiun kune kun eksterlandaj gastoj (FRG, Ĉeĥoslovakio, Pollando) partoprenis 29 personoj.

Dum la konferenco, kiun gvidis s-ro H. Behrmann, la direktoro de la Tutlanda Klerigteknika Centro, d-ro Gyula Simon, en sia ilustrita prelego prezentis la laborkampojn, taskojn kaj organizon de sia institucio. Li emfazis, ke la Centro, fondita de Unesko en la jaro 1973, komence havis nur du dungitojn, sed poste fariĝis institucio de tutlanda graveco kaj nun havas 57 kunlaborantojn kaj viglajn internaciajn rilatojn.

Prof. d-ro Helmar Frank, direktoro de la Esplor- kaj Evolu-Centro pri Pedagogia Kibernetiko en Paderborn (FR Germanio), prelegis pri la instruaŭtomatoj, evoluigitaj kaj aplikataj ĉe lia Centro. Li aparte detale prezentis la aŭtomaton ROBBIMAT II KYBERNET, kiu celas individuan instruadon sinkronan kaj kies rapideco estas reguligebla kaj permesanta tujan ripeton. Ekde 1974, tiu aŭtomato estas aplikata en Paderborn kaj en Parizo.

Prof. d-ro István Szerdahelyi, estro de la Esperanto-fako ĉe la Filologia Fakultato de la Scienca Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, en sia mallonga prelego, kiu tamen vekis grandan intereson, skizis la nuntempan situacion de la programita instruado en Hungario kaj tiurilatajn taskojn en la estonteco. Li malkaŝis, ke la programado kiel metodologia principo

ankoraŭ ne estas tute ĝenerale konata kaj akceptita. Li akcentis, ke la teknikaj instrumentoj – de magnetofono kaj diaprojekciilo ĝis lingvolaboratorio kaj instruaŭtomato – estas nur helpiloj, kiuj plifortigas la efikon de bona programo. Do, gravas la programo kaj oni devas instrui la programadon al la estontaj pedagogoj, kiuj devos plenumi la postulojn de la moderna, efika instruado.

D-ro Béla Balázs, profesoro ĉe la Ekonomika Universitato Karl Marx en Budapeŝto, prezentis individuan instrumaŝinon, kiun li mem projektis. Ankaŭ d-ro Simon prezentis (per sonfilmo) la instruaŭtomaton MAGNOCOR, produktitan de budapeŝta firmao. Ĝi servas por grupa instruado kaj jam vaste estas uzata en Hungario.

La eksterlandaj gastoj montris surprizon pri la hungaraj eksperimentoj kaj rezultoj. Tio eĉ plifirmigis la ideojn de prof. Frank – pere de Esperanto kompili resumaron de la fakaj revuoj, kiuj aperas tra la mondo kaj traktas pedagogian kibernetikon, klerigteknikon k.s. Tia resumaro plirapidigus la informfluron inter la fakuloj kaj helpus, ke konatiĝu tiukampaj rezultoj ankaŭ en la landoj, kies lingvoj ne estas konataj ekster iliaj landlimoj.

La partoprenintoj de la konferenco kun aparta intereso akceptis la prelegon de la programprojektisto inĝ. Antal Münnich, kiu parolis pri la karakterizaĵoj de la problemorientita komputila programlingvo PROGRESO 1, kiun inĝ Münnich ellaboris surbaze de Esperanto, kiu pro sia reguleco jam anticipe taŭgas kiel internacia lingvo de komputiloj.

La laborlingvoj de ĉi tiu interesa konferenco en la hungara ĉefurbo estis Esperanto kaj la lingvo de la gastiganta lando.

Zsuzsa Barcsay



Prof. d-ro Béla Balázs (meze) dum la prezentado de nova instruaŭtomato. Atente rigardas prof. d-ro H. Frank (maldekstre), Z. Barcsay kaj inĝ. A. Münnich (dekstre).

Esperanto en Perspektivo, Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo, de Ivo Lapenna (ĉefredaktoro), Ulrich Lins (redaktoro) kaj Tazio Carlevaro. London/Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo), 1974. 876p. 20cm. Ilus. Bind. 84,— gld.

Recenzas: G. Waringhien (Francio), V. Benczik (Hungario), J. Pool (Kanado), D. Blanke (Germana Dem. Respubliko), K. Kurisu (Japanio) kaj J.C. Wells (Britio).

Monumenta verkego

KIAM, ĉirkaŭ 1916, mi ekinteresiĝis pri Esperanto, falis en miajn manojn libro de prof. G. Gautherot *La Question de la Langue Auxiliaire Internationale*, kiu tiam ŝajnis al mi ĉefverko de propagando.

Evidente pro sia dato (1910) ĝi rapide perdis multon el sia valoro, sed ĝi restis ĉiam por mi la modelo de tio, kion oni devus fari por informi la kleran publikon pri tiu grava socia demando: ĉar finfine temas pri nenio alia ol trovi la plej oportunan kaj pensparan rimedon transdonadi inter homoj kaj generacioj la fruktojn akiritajn de la kulturo kaj scienco. Tial mi ĝoje aplaudis, en 1954, la aperon de *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, redaktita de mia amiko Ivo Lapenna; malgraŭ ia nombro da neĝustaj, ŝulditaj precipe al liaj kunlaborantoj pri la literaturo kaj bibliografio, ĝi estis verko solide utila kaj fruktdone utiligita, kiel pruvis ĝia rapida elvendiĝo.

La libro, kiu estas nun disponigita al la publiko, estas ja io tute alia, ol ĝisdatigita dua eldono de la antaŭa verko. *Esperanto en Perspektivo* pli ĝuste prezentigas kiel unu el tiuj "Sumoj", kiujn tiel ŝatis la mezepokaj kleruloj: ĝi ampleksas la tutan demandon pri la Lingvo Internacia kaj pri la Esperanta Movado, de la komenco ĝis la jaro 1973, en kiu finiĝis la redaktado. Utiliginta la laboraĵojn, kiujn estigis kaj publikigis la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kiun li mem kreis kaj gvidis, kaj la amason da scioj kaj spertoj, kiun li akiris dum siaj 19 jaroj da aktivado kiel Ĝenerala Sekretario kaj kiel Prezidanto de UEA, Ivo Lapenna donas al ni monumentan, enciklopedian verkegon, kiu entenas samtempe historian kompendion, ĉiuf flankan informilaron kaj perspektivojn pri la estonteco. En tiu vasta entrepreno li estis feliĉe helpata de du rimarkindaj junaj specialistoj: la germano Ulrich Lins, kies pedanta, skrupula labormetodo estas jam bone ŝatata de la kleruloj, kiuj aprobis lian elektiĝon kiel ĉefredaktoro de la kompilata dua eldono de la *Enciklopedio de Esperanto*, kaj la sviso Tazio Carlevaro, kiu prizorgas gravan arkivfonduson en La Chaux-de-Fonds. Ne kalkulante multajn detalajn, valorplenajn kunlaborantojn, oni povas diri, ke esence d-ro Lapenna prenis sur sin ĉion,

kio rilatas la internan kaj eksteran politikon de la Movado, U. Lins la historion de la organizado kaj de la polemikado kontraŭ nia lingvo, T. Carlevaro la kulturan kaj literaturan flankojn.

Estus tede elnombri la 23 ĉapitrojn, kiuj konsistigas la verkon; mi diru almenaŭ, ke la amplekso de la materialo iras de la lingvo mem, ĝia loko en la evoluo de la homa civilizo, ĝia instruado, ĝia literaturo libra aŭ periodaĵa, ĝis la sociaj formoj, kiujn alprenis la ideo de Lingvo Internacia por varbi anojn kaj ilin organizi en societojn, kapablajn fronti ĉiajn obstaklojn kaj provi trudi al la indiferenta aŭ malamika mondo tiun nemalhaveblan ilon de interkompreniĝado. Vastega programo, plenumita kun la ĝusteco, klereco kaj viveco, kutimaj al la ĉefredaktoro kaj al liaj helpantoj. La historio, ekz-e, de la disputriĉa, krizoplena kaj malfacila naskado de strukturita movado, legiĝas kiel romano. Iuj verŝajne miros, kiel tiom da negativaj ecoj — ĉikanemo, envio, ambicio, malamo — povas loĝi la animon de homoj, kiuj dediĉis sin al la propagando de Esperanto kaj ĝia "interna ideo": Pensi tiel estus forgesi, ke mondo, en kiu pli forte ol iam floradas, fojfoje sub plej subtila vesto, la naciismoj, se ne la rasismoj, prezentas por la disvolviĝo de lingvo internacia la plej malfavoran medion, kaj ke ĝiaj miasmoj neeviteble infektas pli aŭ malpli eĉ la plej sincerajn el ni; la miraklo estas male, ke en tiaj kondiĉoj la esperantismo sukcesis plu vivi kaj kreskadi.

Ne ĉion mi povis kontroli, sed ĉiuj sondoj montris al mi, ke la verko entute estas plene fidinda: unu erareton mi tamen citos, ĉar mi mem ĝin kaŭzis: p. 123, Pirro ne estas pseŭdonimo, kiel mi hipotezis en *Lingvo kaj Vivo*: Jespersen malkovris, ke Jean Pirro (1832-1886) estis ja germandevena lorenano.

Antaŭ tiel riĉa provizo de faktoj, referencoj kaj orientiloj, plej oportune klasitaj kaj indeksitaj, oni sentas nur unu bedaŭron: ke tiu esenca verko ne aperis en unu el la grandaj vehiklaj lingvoj de la mondo. Ĉar se en ĝi, en tiu vera biblio de nia movado, ĉiu el ni havas multon por lerni, ĝi estas tamen unua- cele direktita al la ne-esperantistoj, kiel arsenalo da

argumentoj kaj konvinkoportaj faktoj. Se la nunaj cirkonstancoj ŝajne malhelpos plenan tradukon en la angla, franca aŭ rusa ktp., estas almenaŭ la devo de ĉiu Esperanta aktivisto ĉerpi el ĝi tiom, kiom li povos enŝovi en sian nacian gazeton, en nacilingvajn prelegojn ktp.: biblio sen interpretistoj estus nur peza ŝarĝo en la manoj.

Tiu ĉi “kompaniono de la Esperantaj studoj”, se mi kuraĝas ŝteli klasikan titolon, prezentas la lastadatan kaj plej konsiderindan produkton de CED, en kiun ties fondinto, d-ro Lapenna, metis ne nur jarojn da prilaborado, sed ankaŭ sian tutan fervoron kaj la fruktojn de longa spertiĝo. Mi volas ĉi tie esprimi al li mian admiron kaj dankon, kaj esperi, ke, malgraŭ ĉiuj minacoj, kiujn politiko de strikta ŝparemo povus levi, ĉi tiu limŝtonego montras, ne simple la finon de eventoplena kaj glora etapo, sed ankaŭ la komencon de nova antaŭeniro laŭ la sama vojo.


Prof. G. Waringhien, Francio

Surprizas ĝia maksimuma kompleteco

LA ĈAPITROJ 5, 6 kaj 7 de tiu ĉi impona volumo traktas la Esperantan literaturon. Karakterizante la jenajn priliteraturajn ĉapitrojn oni rimarkas du ĉefajn intencojn: unuflanke, strebadon por fari ĝenerale validajn teoriajn konkludojn, aliflanke, klopodon atingi maksimumajn koncizecon, precizecon kaj kompletecon.

La ĉapitro 5 estas dediĉita al teoriaj konstatoj pri la Esperanta literaturo. La aŭtoro — Tazio Carlevaro — tre laŭdinde klopodas ne ŝiriĝi disde la traktita materialo kaj ĉiam citas pruve konkretajn nomojn, verkojn, fenomenojn, do, liaj konstatoj neniam pendas en la aero. Dubantoj pri la ekzistorajto de la Esperanta literaturo ricevas bone motivitajn kontraŭargumentojn. Bedaŭrinde la temo de la socia/sociologia ekzisto de nia literaturo ne estas tuŝita, kvankam volonte oni legus ion pri ĝia funkcio en la Movado, tiel el la lingva, kiel ankaŭ el enhava vidpunkto. La ĉapitro tiel nur konvinkas, ke ĝi povas ekzisti kaj ĝi ekzistas — almenaŭ lingvistike —, sed diable, ĉu ĝi *devas* ekzisti, tia, kia ĝi estas, aŭ estas iaspeca lukso, kiun la Movado povas permesi al si?

La ĉapitro 6 — iom malpli ol 70 paĝoj — pritraktas la originalan beletron. La kvanto de la prezentita materialo estas vere respektinda: neniue grava nomo aŭ verko inter 1887 kaj 1972 estas preteratentita. Kompreneble, mankas loko por longaj analizoj, sed eĉ tiu vortŝpara prezento kapablas orienti iomete. Tiel la ĉapitro bone plenumas la rolon de konsultlibro: ĝi enhavas — almenaŭ duonfaze — ĉion necesan. Ĝi



povas servi ankaŭ kiel bonega kaj fidinda elirpunkto por literaturhistoriistoj kaj kritikistoj.


La pritrakto de la traduka beletro — ĉapitro 7 — en si mem estas unikaĵo: laŭ mia scio neniam ĝis nun ĝi estis tiel amplekse kaj detale resumita. Kaj la resumo ne malmulte impresas la leganton: tiel multe ni faris? Ni esperu, ke tiu ĉapitro — krom sia evidenta scienca signifo — stimuletos iom ankaŭ la libromerkaton. Aparte valoraj estas la subĉapitroj 7.4 kaj 7.5, kiuj pritraktas la rolon de Esperanto kiel *fonto-lingvo* kaj *ponto-lingvo*. Serioza nacilingva informado devos maksimume ekspluati ilin ambaŭ.

Resumante: niaj literaturistoj kaj kleraj legantoj ricevis bonegan konsultlibron, en kiu kuniĝas la avantaĝoj de enciklopedio kaj eseo. Konsiderante la cirkonstancojn, agrable surprizas ĝia maksimuma precizeco kaj kompleteco. Nur sola kritiketo: kial oni ne dediĉis pli da spaco — precipe en la ĉapitro pri la originala beletro — al la bibliografio, ja la kremo de nia literaturkritika literaturo modestas forgesita sur paĝoj de malnovaj revuoj?

Vilmos Benczik, Hungario

Ne nur manlibro, sed — epopeo

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO estas pli ol manlibrego aŭ enciklopedieto. Ĝi estas la epopeo de la Internacia Lingvo. Ĝi estas *via* epopeo; legante ĝin, vi profunde ekkonos la tradiciojn, aspirojn, atingojn, erarojn, heroojn kaj eĉ martirojn de la lingva komunumo, al kiu ankaŭ vi apartenas. Vi rimarkados en vi sentojn de respekto por la jen glora, jen tragedia



La libro kaj ĝiaj aŭtoroj: Prof. d-ro Ivo Lapenna (maldekstre), ĉefredaktoro, Ulrich Lins (dekstre, supre), redaktoro, kaj Tazio Carlevaro (dekstre, sube) plenumis gigantan laboron, kiu kondukis al la publikigo de “Esperanto en Perspektivo”.

grandiozo de tiu komunumo, kaj vi sentos fieron pri via membreco en ĝi. Nepre legu: ĝi faros vin pli scia kaj pli konscia esperantisto.

Estus tamen ne ĝuste, supozi, ke unu libro, eĉ kun 876 paĝoj, donus ĉiujn necesajn sciojn pri la lingva problemo kaj Esperanto. Rigardu, kiom da spaco la aŭtoroj dediĉis al la diversaj temoj: la Esperanto-movado – 422 p. (369-96, 409-802); la literaturo de Esp. – 219 p. (115-21, 124-335); aliaj aplikoj de Esp. – 45 p. (336-68, 397-408); la lingvo-problemo – 34 p. (3-34, 113-14); Esperanto kiel lingvo – 11 p. (36-44, 57-58); aliaj mondlingvaj projektoj – 3 p. (122-24).

La unuaj tri listitaj temoj estas traktitaj tiel funde, ke *Esperanto en perspektivo* estas aŭtoritata, ĝis nun definitiva studo pri Esperanto kiel socia kaj kultura fenomeno. Tiu emfazo estas tute prava, ĉar, kiel la aŭtoroj mem indikas, eĉ la plej bazaj faktoj pri tiu aspekto de Esperanto, ekz. ke ĝi entute havas originalan literaturon, restas ankoraŭ nekonataj inter la plej multaj homoj. Dum la lingvaj ecoj de Esperanto estas konataj aŭ almenaŭ ĉie koneblaj per lernolibroj kaj vortaroj, *Esperanto en perspektivo* provizas la rimedon, per kiu fidinda informaro pri la eksterlingvistika flanko de Esperanto povus iĝi alirebla por la tuta homaro.

Tio signifas, ke nacilingvaj tradukemuloj nepre elektu la fortajn, detalajn pritraktojn de la unuaj tri temoj por traduko. La diskutoj pri la lastaj tri temoj estas tiel dense resumitaj, ke ĝenerale ili bone servas por la ekorientigo de la esperantista leganto, sed tute ne

indikas ĉion, kion ni scias pri la koncernaj temoj. En nacilingvaj tradukoj tiuj partoj eĉ riskus grave misŝajniĝi al kompetentuloj, ke la aŭtoroj estas neinformitaj pri pluraj bazaj aspektoj de la nuntempaj lingvoscienco, socilingvistiko kaj psikolingvistiko, pri diversaj mondlingvaj projektoj kaj pri la lingvo-problemo ĝenerale. En la estonteco, egale profundaj studoj pri la temoj, kiujn oni ĉi tie nur tuŝis, multe helpus al nia propra informiĝo kaj sekve al ekstera informado.

D-ro Jonathan Pool, Kanado

Anticipa resumo de la Enciklopedio

EĈ TIA VERKEGO kiel *Esperanto en Perspektivo*, prezentanta plej komplete la ĝisnunajn praktikajn atingojn de Esperanto, estas kompletigebla en dua eldono. Ekz. dezirindus science ekzaktaj ĉapitroj i.a. pri: ne-esperantaj solvo-provoj de la internacilingva problemo kaj ties ŝancoj; sinteno de lingvistiko al planlingvoj; interlingvistiko kaj esperantologio; strukturo, evoluo, komunikad-potencoj de Esperanto; eksteresperantisma valoro de Esperanto (por ĝen. lingvistiko k.s.).

Precizaj kaj detalaj fontindikoj (speciale en la 19a kaj 21a ĉapitroj) bonvenus same kiel aldono de citaĵo-tradukoj en la nacilingva originalo. Krom amasegon da bonordigitaj faktoj EenP enhavas ankaŭ multajn tezojn indajn al konstrua diskuto: Ekz., ĉu vere ekzistas “spontana, aŭtomata aŭ memefika solidara funkcio” (p. 370) de Esperanto? Ĉu ne estas troige, kvalifiki Esperanton “lingva esprimo de la plej pura humanisma internaciismo” (p. 550)? Ĉiu noveldono de la “interna ideo” kaj similaj mistikaĵoj impresas neserioza. Pri kelkaj ĉapitroj nur notete: La bonega studo pri la scienca apliko de Esperanto (8a ĉap.) estonte eble enhavu pli ampleksan kaj dokumentitan ĉapitreton “la lingva problemo en la scienco” (p. 249 k.s.) utiligante ankaŭ nacilingvajn fontojn. En la 14a ĉap. pri la evoluo de la monda organizo ĝis 1948 i.a. pensigas la aktualega Hodler-a ekkono, ke la sorto de Esperanto “estas intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia” (p. 437). Malgraŭ ampleksa pritrakto de la landaj movadoj multo aldoneblus per pli da konsultoj de landaj kompetentuloj (15a ĉap.). En la prezento de la TEJO-historio (17a ĉap.) mankas gravaj post-Tyresö-aj agadoj en prestiĝaj internaciaj kongresoj kaj organizaĵoj. La tre instrua 19a ĉap. kompletigeblus per monro de pli da peresperantaj aktivecoj de la laboristaj esperantistoj (i.a. esperantfonta nacilingva proleta informado), ĉar tiuj bone instruas pri rilatoj inter porsocia uzo kaj disvastigo de la lingvo.

Kvankam utilas skribi ankaŭ pri persekutoj kontraŭ Esperanto, tio tamen nur servu al la movado!

Tial malpli da konjektoj, supozoj aŭ necertaj interpretoj kaj pli strikta limigo al pruveblaj faktoj kun detala fontindiko preferindas. Skribante pri “perspektivoj” oni, strange, forgesas apliki la Hodlerajn vortojn (v. supre) al la nuntempo: Por Esperanto pleje necesas paco, malstreĉiĝo kaj normalaj internaciaj rilatoj. Tio subtenendas, ĉar propra-interese. Malgraŭ kritikoj, ĉe tia verkego neeviteblaj, ĝi estas giganta trezoro, certagrade anticipa resumo de la prestiĝonta (?) *Enciklopedio*, nepre posedenda.

Detlev Blanke, Berlin (GDR)

Informriĉa kaj instruplena

VERE GRANDIOZA, informoriĉa kaj instruplena verkego, nepre havinda por ĉiu aktiva esperantisto. Malgraŭ tio, tamen, ŝajnas al mi, ke la sesa kaj fina parto titolita “Perspektivoj por la estonteco” estas iom malforta kiel konkludo de la tuta libro, ĉar ĝi estas nenio alia ol la t.n. Madridaj tezoj el 1968 nur iom modifitaj. Certe tiuj tezoj estis ĝis nun ne sufiĉe bone plenumitaj, precipe ne de multaj el la landaj asocioj inkluzive la japanan, al kiu mi apartenas, kaj tio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj, kiuj bremsis la progreson de nia movado. Sed laŭ mi, la Madridaj tezoj ne plu sufiĉas kiel recepto por la progreso. Al mi ŝajnas, ke jam estas tempo, ke ni radikale, eĉ draste reformu la strukturon de nia tutmonda movado. Ĉar, kiel ni povas deklari al neesperantista publiko, ke ni estas tutmonda movado kaj organizo, kiam ekz. nia centra organo estas legata tutmonde nur de 7 000 homoj, kiam bona novelaro de Sándor Szathmári *Maŝinmondo*, eldonita de Stafeto antaŭ 10 jaroj nur en 1 000 ekzempleroj restas ankoraŭ nun ne elvendita, kaj, aliflanke, oni konsideras kvazaŭ grava atingo, ke de *Plena Ilustrita Vortaro*, kiu eldoniĝis en 1970 en 5 000 ekzempleroj, jam vendiĝis pli ol 4 000 ekzempleroj?

Ĉu ni ankoraŭ estas efektive tiom malfortaj? Ne, tute ne! Ĉar ni jam havas en la mondo eĉ 32 000 asociajn membrojn. Kial do ni ne povas fari, se ne ĉiujn, do almenaŭ multajn el ili individuaj membroj, precipe MA aŭ J-MA, t.e. membroj kiuj ricevas ne nur la Jarlibron sed ankaŭ la revuon *Esperanto*? Ĉu tion malhelpas valutaj malfacilaĵoj en pluraj landoj orient-eŭropaj? Sed ankaŭ en tiuj landoj jam aperas sufiĉe multe da Esperantaj libroj kaj internaciaj gazetoj per kiuj oni povus facile pagi la kotizojn de individuaj membroj. Ni ne fieru, ke nia LA havas milojn da membroj, sed ni pli bone fieru, ke nia LA havas multe da individuaj membroj de UEA. Tiaokaze *Esperanto* aperus ekz. en 20 000 ekzempleroj, *Maŝinmondo* en, ni diru, 3 000 ekz., kaj PIV baldaŭ elvendiĝus kaj

reeldoniĝus en pliaj 5 000 ekz. Mallonge dirite, ni devus forigi el nia movado ne simple defetismon, kiel ripetas en la fina parto de la libro la ĉefaŭtoro, sed ankaŭ pasivan sintenon kaj ekpreninte pli aktivan sintenon transiri de defensivo al ofensivo. Jen la ĉefa penso, kiun mi ekhavis rapide traleginte ĉi tiun sendube monumentan verkegon.

Kurisu kei, Japanio

Kalejdoskopio de fakoj kaj aplikoj

UZANTE LA ESPRIMON “faka” kiel epiteton por Esperanta literaturo, terminaro, periodaĵo, organizaĵo, oni pensas ne nur pri branĉoj de scienco kaj arto (fiziko, medicino, juro, muziko), sed ankaŭ pri plej diversaj aliaj specialaĵoj, de vivfilozofioj ĝis hobioj, (religio, socialismo, stenografio, filatelo). En kvin ĉapitroj EEP pritraktas la aplikon de la Internacia Lingvo al tiu kalejdoskopio de homa agado. Kia laboro necesis por la eldonado de tiom da fakaj libroj, terminaroj kaj revuoj, kaj por la kreo de tiom da organizaĵoj! Nura listigo de fakaj verkoj en Esperanto plenigas 25 paĝojn, kaj katalogo de la ĉefaj terminaroj ankoraŭ 9 paĝojn. Ĝenerala impresio? Kvankam ni povas esti relative kontentaj pri bona laboro en, ni diru, kemio aŭ la fervoja fako, necesas tamen konscii la bedaŭrindan malfortecon de Esperanto en multaj fakoj ne menciitaj en EEP-de aviado kaj antarkta esplorado ĝis televido kaj teniso. Daŭre regas la lingva ĥaoso; minacas ĉehorizonte tiraneco de la plej forta lingvo. Necesas strebi plu.

En la ĉapitro “Instruado de Esperanto” oni legas pri frapa progreso tra la jaroj: lernolibroj en ĉiam pli da lingvoj (nun sume 56); instrumetodoj unue “gramatikaj”, poste “rektaj”, hodiaŭ preskaŭ ĉiam “miksitaj”. Lastatempaj tendencoj estas du: unuflanke, aŭdovidaj kaj lingvolaboratoriaj metodoj, aliflanke pli da atento denove al lerniloj por la memlernanto. La ŝancoj de Esperanto kiel lerneja studobjekto fluktuis neklarigeble. Inter 1959 kaj 1969 la nombro de lernejoj ĝin instruantaj falis en Jugoslavio de 171 al 35, sed kreskis en la najbara lando, Bulgario, de 1 al 75. Kiu scias kial? Kion ni konkludu? Cetere, decidiga progreso sur tiu fronto kredeble venos nur kiam la Internacia Lingvo havos nekontesteban ekonomian valoron, ĉu por la ŝtato, ĉu por la individuo.

La stilo de EEP tre varias. Estas neeviteble, ke kelkloke ĝi konsistas el sekaj katalogoj, multloke ĝi similas al Estrara Raporto de UEA, kaj foje ĝi tuŝas apogeojn de banaleco (tiel *Bildlibro pri Bestoj*, p. 74 estas “belega donaco por geknaboj kaj samtempe tre utila libro por serioza studanto, precipe por interesigantoj pri la animala mondo”). Sed aliloke ĝi kaptas la atenton kvazaŭ inspira kaj streĉa romano.

D-ro J.C. Wells, Britio

Laste aperis...

Amoro kaj amo P.C. Hooft (1581-1647) El la nederlanda trad. W. Pilger. Amsterdam: Vulpo, 1974. 15p. Ilus. 16 cm. Broŝ. 1,80 gld. Ampoemoj de la ĉefa figuro de la nederlanda Renesanco.

Atomcentraloj Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1974. 26p. 21 cm. Broŝ. 0,60 gld. Debatkroniko el la 29a kongreso de SAT-Amikaro, Agen 1974.

CED/7: Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo 21 p. 23 cm. Broŝ. 0,60 gld. Hebrea traduko.

Ĉinaj Akrobataĵoj Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1974. 107p. Ilus. 21 cm. Broŝ. 3,30 gld. Bildlibro grandparte kolora, kun klarigo en Esperanto, la germana kaj la hispana.

Ek! H. Behrmann. Div. trad. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1974. 191p. Ilus. 17x17 cm. Broŝ. 15,— gld. Konkizigita unuvoluma sveda versio de *Esperanto-programita*.

Geografio de Ĉinio Div. aŭtoroj. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1974. 110p. Ilus. Mapo. 19 cm. Broŝ. 1,20 gld. Artikolaro.

Herezulo - Herezaĵo E. Lanti. Laroque Timbaut: La Juna penso, 1974. 43p. 21 cm. Broŝ. 0,90 gld. Artikoloj diversaj.

Historia materiismo A. Pannekoek. Div. trad. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1974. 32p. Mim. 21cm. Broŝ. 0,90 gld. Du artikoloj de nederlanda komunisto.

Hodiaŭa Tibeto Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1974. 117p. Ilus. 26 cm. Broŝ. 3,— gld. Fotolibro grandparte kolora: du-lingva, angla-Esperanta.

Kvina evangelio, La Han Riner (pseŭd. de H. Ner, 1861-1938). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1974. 138p. 21 cm. Broŝ. 3,60 gld. La vivo de Jesuo nove interpretita.

Libroj 15p. Ilus. Katalogo de Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando. Senpage havebla ĉe la eldonejo.

Ne ĉiam W. Pilger. Amsterdam: Vulpo, 1974. 15p. Ilus. 16 cm. Broŝ. 1,80 gld. Poemaro originala.

Por tutmonda libera komerco Dresden: Zeit im Bild, 1972. Kolorilus. 21 x 19 cm. Broŝ. Informilo pri GDR.

Prefiksitaj vortoj el Zamenhof, Plena Vortaro rusa-internacia, 2a eldono, 1896 N. Kawasaki. Oosaka: la aŭtoro, 1974. 84p. 19 x 25 cm. Krampita. 2,—gld.

Proverbaro Esperanta L.L.Zamenhof, ed. C.Rogister. La Laguna: Régulo, dua eld. 1974. 167p. 19cm. Broŝ. 9,— gld. (Beletraj Kajeroj, 10). Represo de la *Proverbaro* kun enkonduko kaj post-parolo de G.Waringhien, antaŭparoloj de M.Fabianović kaj de Zamenhof mem, kaj analiza indekso.

Sun Vukong trifoje batis Skeletospiriton Pekino: Fremdlingva Eldonejo, dua eld. 1974. 110p. Ilus. 25 cm. Broŝ. 0,90 gld. Simpla rakonto arte ilustrita laŭ tradicia ĉina stilo.

Teaching of the international language Esperanto Eŭropa Konsilio, konsulta asembleo, komitato pri kulturaj kaj sciencaj demandoj. London: Brita Esperanto-Asocio, represo 1974. 10p. 21 cm. Broŝ. 1,80 gld. Raporto pri Esperanto el 1956.

Tra la mondo per biciklo Alfa-Beta. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1974. 44p. Mim. 21 cm. Broŝ. 0,90 gld. Memoroj pri mondvojaĝo farita en la 30aj jaroj.

Verdkata Testamento R. Schwartz (1894-1973). Åbyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, represo de la 2a eld. 1974. 20cm. Broŝ. 8,10 gld. Poemaro humura, heredaĵo de la iama kabareto "Verda Kato", kun konciza enkonduko de R. Hauptenthal.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Antaŭ 50 jaroj

La animo de nia movado

"Ni ĉiam sentis, ke nia lingvo, per sia vivo mem kaj per sia disvastiĝo en la mondo, disportas tiun tut-homaran konscion kaj kreskigas ĝin en individuoj eĉ sen aparta priparolo. Ĝi posedas kaj dissemas tiun trezoron, kiu ĝuste mankas al la Ligo de Nacioj, ankoraŭ tro diplomata: la animon interpopolan. Tion ĝi faras eĉ silente same kiel nova freŝa fonto iom post iom dispenstras sekan valon kaj de kampo al kampo aperigas la verdon tie, kie grizaĉis dezerto."

Edmond Privat

Tabakkontraŭula Asocio

"Jus aperis *Verda Kruco*, verkfolioj de Esperantista Tabakkontraŭula Asocio. Rilate al la granda signifo, kiun meritas la internacia batalo kontraŭtabaka, estas tre grave, ke ankaŭ en Esperanto aperas publikigilo de tiu ĉi movado."

"Bulgario

La nuna registaro malsimpatie rilatas al Esperanto pro certaj politikaj konsideroj. Dum la lasta 'Verda' propaganda semajno en multaj lokoj la esperantaj

kunvenoj estis malpermesataj; alie oni devis subskribi iajn deklarojn kaj kelkloke oni malpermesis eĉ la gluadon de la propagandtekstaj afiŝoj. Spite ĉio la Esperanto-movado gajnas ĉiam novajn poziciojn kaj ju pli ĝi estas persekutata, des pli ĝi gajnas la simpatian de la popolo, iĝante ĉiam pli ampleksa popola movado." (Eraroj nekorektitaj).

Esperanto, n-ro 294, februaro 1925

"Ĉevalo 'Esperanto'

En sportrubriko de 'Berner Tageblatt', de 24.11.1924, ni trovis noton kun la informo, ke la 'Premion de l' Nacioj', dum la internaciaj ĉasrajdadoj kun baraĵoj de 1,40 — 1,60 cm por pezaj ĉevaloj, gajnis svisa kapitano Herrsche sur la ĉevaloj 'Esperanto', 'Ramunzo' kaj 'Siegfried' kontraŭ Germanio kaj Hungario.

Ni entute ne ŝatas la Esperanto-parfumon, -likvoron, -cigaron, -sapon, -poŝtrancilon ktp. (same kiel Pégoud-ĉapon, Bismarckharengon, Zeppelinkolbason, ktp.), sed malgraŭ tio devas konstati la simptomon de mondkonateco de l' vorto 'Esperanto'."

Ekonomika Kuriero, aldono al *Esperanto*, febr. 1925



Kongresa Komunikilo

60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Nur kvar pli grandaj

Nur 4 kongresoj okazontaj en Danlando en 1975, laŭ la antaŭvidoj, estos pli grandaj, ol la Universala Kongreso de Esperanto. Tion montras listo eldonita de la Dana Turisma Konsilo, en kiu aperas 43 kongresoj kaj konferencoj. Atendeble pli grandaj ol la UK estos nur tiuj de ortopediaj ĥirurgoj, biofizikistoj, Monda Federacio pri Mensa Sano kaj Eŭropa Asocio por Dializo kaj Transplanto.

Inaŭguro: Eksperimenta dispartigo

Por Kopenhago la Estraro de UEA decidis dismeti la kutiman programon de la Inaŭguro en du partojn. Ju pli multiĝis en la lastaj jaroj la nombro de registaroj kaj aliaj instancoj reprezentitaj en la Universalaj Kongresoj, des pli sentiĝis la pezeco de ofte trihora solenaĵo. En Kopenhago, do, la pli solena parto okazos matene, kaj en la posttagmezo sekvos dua parto iom malpli formala, kiu samtempe enkondukos la kongresajn laborkunsidojn.

Temoj de laborkunsidoj

En sia kunsido de 1975 01 11-12 la Estraro de UEA decidis, ke la ĉefa temo de la Kongreso en Kopenhago – kaj sekve ankaŭ de unu el ĝiaj ĉefaj laborkunsidoj – estu “La virino”, okaze de la Internacia Jaro de la Virino (proklamita de UN). Krome estas elektita dua temo: “La rolo de la individuo en la Esperanto-movado”, kiu estos pritraktita en novstila kunveno. Unue diskutos ĝin malgrandaj laborgrupoj, en kiuj povos partopreni ĉiuj ĉeestantoj, sub gvido de komitatanoj de UEA, kaj poste iliaj konkludoj estos prezentitaj al la pleno. La celo de tiu aranĝo estas aktivigi kiel eble plej multajn kongresanojn en rekta diskutado.

Dua bulteno en preparo

Post kelkaj semajnoj estos ekspedita al ĉiuj kongresanoj, kiuj ĝis tiam aliĝis, la Dua Oficiala Bulteno, 32-paĝa ilustrita kajero enhavanta necesajn informojn kaj mendilojn por loĝado, ekskursoj, bankedo, postkongreso ktp.

Postkongreso en Aarhus

En la Dua Bulteno de la 60a UK aperos ankaŭ plenaj detaloj pri la Oficiala Postkongreso en Aarhus, kune kun aparta mendilo. Ĝi daŭros de la 3a ĝis la 6a de aŭgusto kaj havos ĉefe ekskursan karakteron. Pri la urbo de la Postkongreso v. la paĝon 24 de ĉi tiu n-ro.

Denove inter floroj

Se la 59a UK en Hamburgo estis kongreso en ĝardeno (“Planten un Blomen”), la sesdeka povus nomiĝi “Kongreso apud parko”. Kvankam la kongresejo Falkoner Centret staras ĉe trafikplena strato, nur 100-200 metroj apartigas ĝin disde la granda parko “Frederiksberg Have”, kie la kongresanoj povos trovi trankvilon kaj refreŝigon inter florbedoj kaj lagoj, aŭ viziti la Zoologian Ĝardenon.

Subvencio jam ricevita

La Universala Kongreso jam ricevis unu subvencion de dana instanco, nome la socia fonduso “Vendelbos sociale Fond”. Ĝi asignis sumon de 4 000 danaj kronoj (ĉ. 1 760 gld.) por subteni la Kongreson. Ekzistas espero ankaŭ pri alia pli granda monhelpo ekster la Esperanto-movado.

Loĝsituacio kontentiga

LKK sukcesis rezervi grandan nombron da litoj en kvin diversaj prezkategorioj, malgraŭ la turisma populareco de Kopenhago precipe dum la someraj monatoj. La prezoj, inkluzive de matenmanĝo, servmono kaj imposto, ampleksas de la plej luksa kategorio – la kongreseja hotelo “Tri Falkoj” – je 208 kronoj (91 gld.) ĝis la komuna loĝejo je 42 kr. (18 gld.) por ĉiu tago kaj persono. Mendilo troviĝos en la Dua Bulteno. Kampadistoj povas jam nun turni sin rekte al la granda kampadejo “Bellahøj”, Hvidlikdevej, DK-2400 København NV (tel. 10 11 50), kiu situas je 3-4 km. de la kongresejo.

Kvar ekskursoj elekteblaj

La ekskursprogramo de la Universala Kongreso estas jam definitiva. Ĝi proponas al la kongresanoj elekton inter du tuttagaj ekskursoj meze en la kongressemajno (ĉi-jare en merkredo) kaj ĉiutaga rondveturo en Kopenhago. El la tuttagaj, unu (dekhora) kondukas per 50-minuta ŝipveturo al suda Svedujo, kie aŭtobuso portos la partoprenantojn al Malmö, Lund kaj aliaj lokoj. La alia tuttaga ekskurso estas 7-hora aŭtobusa vojaĝo tra la laga kaj arbara pejzaĝo de Norda Slando, kun diversaj vizitoj survoje. Ĝi estas mendebla ankaŭ en malpli longa varianto, proksimume duontaga. Ĉiuj detaloj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno.

**La kongresejo de la 60a
Universala Kongreso
de Esperanto —
"Falkoner Centret" kaj
la hotelo "Tre Falke"
(Tri Falkoj) en la koro
de la komunumo
Frederiksberg, kiu
siavice troviĝas en la
koro de Kopenhago,
kvankam ĝi administre
estas konsiderata
kiel aparta memstara
urbo. Ĉiuj laboraj
aranĝoj de la 60a UK
okazos en la konstruaĵoj
videblaj sur ĉi tiu foto.**



Pli detale pri la franca karavano

Pri la jam anoncita aŭtobusa karavano el Parizo atingis nin pli da detaloj. Ĝi daŭros de la 22a de julio ĝis la 7a de aŭgusto, kaj la grupo veturos tra Bruselo, Antverpeno, Rotterdam, Amsterdam, Bremen, Kiel, Hannover, Hamburg, Dortmund, Kolonjo, Aix-la-Chapelle, Luksemburgo kaj Reims. Prezo provizora: 1 500 frankoj. Partoprenontoj anoncu sin ĉe UFE, 4bis Rue de la Cerisaie, F-75004 Parizo; tel. (1) 278 68 86.

Nederlanda karavano anoncota

Baldaŭ aperos detaloj pri flugvojaĝo al Kopenhago, inkluzive de la loĝado, kiun organizas la nederlanda agento de SAS — la oficiala flugkompanio de la 60a UK. Nederlandaj kongresanoj ricevos rekte informojn.

Kontraŭsoifa agado

La kongreslando ĝuas altan renomon sur diversaj kampoj de la scienco kaj kulturo, interalie ankaŭ sur tiu de la sensoifiga arto. Precipe la dana hela biero estas internacie imitata. Ĉiu kongresano havos eblecon iam dum la kongresa semajno esti gasto de la fame konata bierfarejo Carlsberg, kiu afablos gvidi la vizitantojn tra la tuta industrio, kies centro cetere situas ne malproksime de la kongresejo. Kompreneble la gvidado okazos esperantlingve.

Infana kongreseto atendas siajn gastojn

Infanoj aĝaj de 6-ĝis 13-jaraj kaj kapablaj kompreni kaj paroli Esperanton estas invitataj aliĝi al la 15a

Internacia Infana Kongreseto por kunloĝi, ludi, ekskursi kaj interamikiĝi kun infanoj el aliaj landoj. Kotizo: 300 danaj kronoj (132 gld.); por plia frat(in)o: 250 kronoj (110 gld.). Petu aliĝilojn ĉe LKK aŭ ĉe la konstanta adreso en Rotterdam.

Helpu la blindulojn!

Poŝtaj perturboj en pluraj landoj lastatempe grave malhelpis la unuan varbadon por la 43a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazonta de 1975 07 20 ĝis 26 en Hillerød, Norda Selando. Tial ni afable petas ĉiujn legantojn transdoni ĉi tiujn informojn al blindaj esperantistoj konataj al ili. La kotizo de 500 d.kr. (220 gld.) estas egala por ĉiuj partoprenantoj kaj inkluzivas la loĝadon, ĉiujn manĝojn, k.s. Ankaŭ akompanantoj de blinduloj pagas la saman sumon. Ĝi estas pagenda al pĉk n-ro 146048 je la nomo de s-ro K. Klausen, Ramsingsvej 26, IIth, DK-2500 København-Valby. Koresponda adreso: S-ino Zlata Zacho, Åmosevej 5-A, DK-2700 Brønshøj.

Laŭlanda statistiko (ĝis 1974-12-31)

Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 3, Belgujo 14, Brazilo 2, Britujo 40, Bulgarujo 8, Ĉeĥoslovakio 2, Danlando 102, Finnlando 45, Francujo 38, FR Germanujo 62, Grekujo 3, Hindujo 1, Hispanujo 8, Hungarujo 11, Irlando 1, Islando 2, Israelo 2, Italujo 19, Japanujo 14, Jugoslavio 7, Kanado 3, Koreujo 1, Malagasa Resp. 1, Monako 1, Nederlando 65, Norvegujo 7, Nov-Zelando 1, Pollando 7, Portugalujo 3, Rumanujo 1, Sud-Afriko 3, Svedujo 84, Svisujo 9, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 27, Zairo 1. Entute (el 39 landoj): 603 aliĝintoj.

Socia integriĝo

KUN IOMA MALFRUO atingis nin grava novaĵo el Sarajevo (Jugoslavio), kie antaŭ du jaroj okazis la 29a IJK de TEJO. Temas pri la aktiveco de la tiea regiona junulara Esperanto-organizo okaze de kongreso de la ĝenerala junulara organizo de Bosnio kaj Hercegovino, unu el la federaciaj ŝtatoj de Jugoslavio. En la laboroj de tiu kongreso, okazinta meze de oktobro 1974, la regiona Esperanto-junularo estis reprezentita per pluraj oficialaj delegitoj, kiuj aktive aŭdiĝis en la kongresaj diskutoj. Tiuj kontribuoj havis bonan reĥon en la nacilingva gazetaro kaj radio, kaj estis notitaj ankaŭ en la fina rezolucio de la Kongreso. Nun la Esperanto-Junularo de Bosnio kaj Hercegovino estas reprezentita ankaŭ en la gvidorgano de la ĝenerala junulara organizo kiel unu el ĝiaj fakoj. Tio siavice signifas, ke estonte Esperanto aperos en la agadprogramoj de tiu organizo kaj, ke por la Esperanto-Junularo estos rezervitaj ankaŭ regulaj financaj rimedoj. Ĉio ĉi estas akompanata per larĝ-skala informa aktiveco pri la Internacia Lingvo kaj malfermo de pluraj Esperanto-kursoj.

Kongreso de JEFO

LA LANDA SEKCIO de TEJO en Francio, Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), aranĝos sian kongreson inter la 27a de marto kaj la 2a de aprilo 1975 en Mantes la Jolie, survoje de Parizo al Normandio. Simile al aliaj lastatempaj aranĝoj de TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj, ankaŭ ĉi tiu kongreso de JEFO uzos la Internacian Lingvon ne por trakti movadan temon, sed por pridiskuti aktualaĵojn de la hodiaŭa mondo: la temo de la kongreso estos "Demografia eksplodo". La kotizoj por partopreno en la aranĝo varias inter 180 kaj 220 francaj frankoj, depende de la membreco en JEFO, aĝo kaj aliĝtempo; tiuj kotizoj, tamen, kovras ĉiujn restadkoston dum la kongreso. Por pliaj detaloj skribu al: JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

Ŝanĝoj en GEJ

EN PADERBORN, dum la 18a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), fine de 1974 kaj komence de 1975, okazis elektoj de la nova estraro de tiu landa sekcio de TEJO. La nova prezidanto de GEJ fariĝis Ulrich Brandenburg, dum

la ĝisnuna prezidanto Helmut Klünder transprenis la funkcion de la vicprezidanto, kio kompreneble estas normala afero tiel malofte praktikata en la Esperanto-movado. La estraron eniris ankaŭ Hans-Dieter Platz, Klaus Schubert, Franz Kruse kaj Guido Brandenburg. La estraro nomis du novajn membrojn de la Konstanta Komisiono por Internaciaj Seminarioj. Tio ĉi lasta sendube ŝuldiĝas al ĝenerala opinio, ke la 18a Internacia Seminario de GEJ estis sub la nivelo, kiun tiu ĉi aranĝo ĝuas en la internacia junulara Esperanto-movado. Similan prijuĝon gajnis ankaŭ la seminario de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, okazinta samtempe en Paderborn.

Prudenta paŝo

POST KOMENTO EN NIA REVUO (okt. 1974, p. 171), ŝajnas, ke la Estraro de TEJO kaj gvidantoj de kelkaj ĝiaj landaj sekcioj serioze reekzamenis sian eldonan aktivecon. Dum la 18a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, okazinta inter la 27a de decembro 1974 kaj la 3a de januaro 1975 en Paderborn, FR Germanio, la Estraro de TEJO (kiu ŝajne kunsidis tie) kaj reprezentantoj de la landaj sekcioj de TEJO en Belgio, Francio, FR Germanio, Italio kaj Nederlando decidis, ke ekde la komenco de marto 1975, *TEJO-Novaĵoj* kaj *Koncize* (eldonaĵo de la kvin landaj sekcioj) kunfandiĝu kaj aperadu kiel komuna informilo de TEJO kaj ĝiaj sekcioj en la menciitaj landoj. Ankoraŭ ne estas konata la nomo de la nova eldonaĵo, sed oni jam scias, ke ĝin redaktos Michela Lipari el Italio, kiu dum la lastaj du jaroj redaktis *Koncize*. La amplekso de la nova eldonaĵo verŝajne estos ĉ. 12 paĝoj de la formato A5. Aliajn detalojn ni ankoraŭ ne sukcesis ekscii, krom ke la nova eldonaĵo enhavos ankaŭ *InFo* kaj *KER-paĝo*, kiuj ĝis nun estis parto de *TEJO-Novaĵoj* aŭ *NNN*, ĝia pli populara nomo.

La decido en Paderborn ŝajnas esti prudenta paŝo, ĉar ĝi unuigas disponeblajn laborforton kaj financajn rimedojn.

LA 31a INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO DE TEJO

1975 07 19 – 07 26

Fredericia, Danlando

Adreso: La 31a IJK,
Christian Lauridsen, Østergade 43,
DK-7430 IKAST, Danlando.

Por detaloj pri la 31a IJK vidu la januaran numeron de nia revuo, p. 14. Pliajn novaĵojn pri la aranĝo en Fredericia vi trovos en la marta numero.

Aŭstralio

- La Unua Pacifika Kongreso de Esperanto okazos en Melburno inter la 4a kaj 10a de januaro 1976, tuj post la 20a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 2a ĝis la 4a de januaro. La Pacifika Kongreso estas komuna aranĝo de la Nov-Zelanda kaj Aŭstralia Esperanto-Asocioj, kun jam anoncita partopreno de esperantistoj el Japanio, Usono, Kanado kaj eble el Koreo. La organizon de la kongreso apogas aŭstralia kaj nov-zelanda flug-kompanioj, kiuj presigos apartajn broŝurojn tiurilate. Eŭropanoj rajtas senpage partopreni la kongreson, por kiu la partoprenontoj el pacifikaj regionoj pagas aliĝ-kotizon de 9,50 (11 post la 1-a de julio 1975) aŭstraliaj dolaroj. Adreso por la aliĝoj estas: Esperanto, Box 2122 T. G.P.O. Melbourne, 3001, Aŭstralio.

Jugoslavio

- Diference de la plimulto de aliaj landoj, Jugoslavio ne okazigas sian landan Esperanto-kongreson ĉiujare. Tiaj aranĝoj en Jugoslavio principe estas organizataj ĉiun kvaran jaron. Laŭ lastatempa informo, la 20a Kongreso de Jugoslaviaj Esperantistoj okazos inter la 4a kaj 6a de julio 1975 en la urbeto Ĉakovec, en la nord-okcidento de la lando.

Finnlando

- S-ro A. Pettyn, redaktoro de la Pola Radio kaj komitatano de UEA, en novembro kaj decembro pasintjare pasigis kvin semajnojn en Finnlando prelegante en Esperanto-kluboj, intervjuante por la Pola Radio kaj verkante por polaj gazetoj. S-ro Pettyn estis ankaŭ mem plurfoje intervjuita por finnlandaj gazetoj kaj radio-stacioj.

Soveta Unio

- Antaŭ nelonge aperis kolora bildlibro *Estonio* en la samnoma soveta respubliko. Ni eksciis, ke baldaŭ aperos alia simila eldonaĵo, kiu sur preskaŭ cent paĝoj prezentos la estonan ĉefurbon Tallinn. Inter ses lingvoj en kiuj aperos la bildklarigoj troviĝas ankaŭ Esperanto.

Kubo

- Laŭ letero subskribita de "Plenuma Komitato de Kuba Esperanto-Asocio", meze de aŭgusto 1974, en Havano fondiĝis landa Esperanto-organizaĵo, kiu nun atendas, ke la koncernaj ŝtataj aŭtoritatoj aprobu ĝian statuton. La prezidanto de la organizaĵo fariĝis Oscar Otero Fernández, meteologo.

Italio

- Triesta Esperanto-Asocio estas unu el la plej aktivaj lokaj grupoj en Italio. Tio verŝajne estis la decida argumento por la Itala Esperanto-Federacio, kiu decidis, ke la 46a Itala Kongreso de Esperanto okazu en Triesto inter la 13a kaj 19a de septembro 1975. Meze de decembro pasintjare, la Triesta Esperanto-Asocio aranĝis internacian renkontiĝon, okaze de la Zamenhofa Tago, al kiu venis plurdeko da esperantistoj el Italio, Aŭstrio kaj Jugoslavio. La programo de tiu aranĝo inkluzivis, interalie, viziton al la Urba Biblioteko, kiu havas apartan fakon por la Esperanta literaturo (v. la foton).

Nederlando

- Nederlanda reprezentanto de Eŭropa Esperanto-Centro, s-ro G.F. Makkink, koresponde instigis s-ron C. Laban, membron de la Nederlanda kaj Eŭropa Parlamentoj, skribi starigi al la Komitato de Eŭropaj Komunaj jenajn demandojn: 1) Ĉu la Komitato intencas esplori la eblojn por stimuli la instruadon kaj uzadon de Esperanto en eŭropa kadro? 2) Ĉu la Komitato opinias, ke tio realigus la esperojn, kiujn ĝi esprimis en sia memorando al la Konsilio? 3) Ĉu la Komitato ne konsentas, ke konvinka argumento favore al la uzado de Esperanto kiel dua lingvo en eŭropa kadro estas, ke ĝi forigus la malavantaĝon en internacia komunikado de tiuj, kies patrina lingvo ne estas unu el la plej vaste uzataj lingvoj? Laŭ s-ro Makkink, estus grave, ke tiuj esperantistoj, kiuj pozitive povus influi membrojn de eŭropaj institucioj, instigu ilin al subtenaj paŝoj.

- La tradicia trilanda renkontiĝo de esperantistoj el Belgio, FR Germanio kaj Nederlando ĉi-jare okazos en la nederlanda urbo Weert, la 3an kaj 4an de majo 1975. Samloke kaj dum la samaj tagoj, la nederlanda sekcio de ILEI aranĝos sian jarkunvenon. Pliajn detalojn pri la renkontiĝo bv. peti ĉe s-ro L. Hendrix, Slotstraat 15, Weert, Nederlando.

Kolombio

- Kiel ni jam raportis en la januara numero de nia revuo (p. 2), la Esperanto-movado en Kolombio lastatempe notas grandajn sukcesojn. El antaŭ nelonge veninta korespondaĵo ni eksciis, ke la enkonduko de la Internacia Lingvo ĉe la Ĵurnalisma Fakultato de la Universitato Pontificia Bolivariana (v. la raporton en la januara numero), interalie ŝuldiĝas ankaŭ al grava apogo de la Nacia Unesko-Komisiono de Kolombio.

Ĉinio

- Laŭ *El Popola Ĉinio* (januaro 1975), meze de oktobro 1974 en Ĉinio gastis vjetnama Esperanto-delegacio. La delegacio, kiu konsistis el s-roj Dao Anh Kha, ĝenerala sekretario, kaj Nguyen Dinh Phung, komitatano de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, venis laŭ invito de la Ĉina Esperanto-Ligo, kies prezidanto Hujucz kaj vicprezidanto Ĵelezo interparolis kun la delegacio kaj aranĝis bankedon honore al la gastoj. En 3-paĝa raporto pri la vizito *El Popola Ĉinio* mencias ankaŭ renkontiĝon kun pekinaj esperantistoj en salono de la Nacia Hotelo, kie "troviĝis ĉinaj veteranoj kaj junaj geesperantistoj."

Belgio

- Sub la nomo "Amikeco trans limoj" oni organizas la trian "Marŝon de Eŭropo". Temas pri aranĝo celanta ĉefe junajn homojn, kiuj inter la 29a de marto kaj la 11a de aprilo piediros kelkajn centojn da kilometroj inter Bruselo kaj Strasburgo. La celo de la Marŝo estas atentigi la ĝeneralan publikon pri la nunaj problemoj kaj perspektivoj de Eŭropo, inkluzive de la lingva problemo. Pliajn detalojn bv. peti ĉe: s-ro René Rochette, 18, rue Gatti de Gamond, B-1180 Bruxelles, Belgio.

Eldonaĵoj

- Fine de la jaro 1974, en Varsovio aperis pli ol 100-paĝa ilustrita broŝuro *Pollando – nombroj kaj faktoj*. Krom la bazaj informoj pri la lando, ĝiaj popolo, historio, kulturo kaj diversaj aspektoj de ĝia nuntempa vivo, la broŝuro enhavas ankaŭ 8-paĝan skizon pri la historio de la Esperanto-movado en Pollando, verkitan de Jerzy Grum.
- Laŭ gazetara bulteno de bulgara turisma instanco, la konata periodaĵo *Nuntempa Bulgario* baldaŭ reaperos en la Internacia Lingvo. Por pliaj informoj skribu al: Sofia-pres, Esperanto, Levski 1, Sofia, Bulgario.

Instruistoj

- Sekve de la pasintjara instruista aranĝo sub la nomo "Eŭropa semajno", inter kies partoprenintoj duono estis esperantistoj kvankam Esperanto ne estis laborlingvo de la aranĝo, ĉi-jare, inter la 7a kaj la 10a de aprilo, oni organizas la 18an Eŭropan semajnon kun Esperanto inter la laborlingvoj de la aranĝo. Por pliaj detaloj necesas kontakti la organizanton: Pastro R. Busse, direktoro de la Kolegio Sainte-Croix, 1, rue de Crehen, B-4280 Hannut, Belgio.

Kursoj

- Sekve de intensaj pasintjaraj kontaktoj kun la loka kaj regiona gazetaro (v. nian decembran numeron, p.215), la ArnHEMA Esperanto-Komitato en Nederlando atingis, ke tri lokaj gazetoj (kune pli ol 200 000 ekzempleroj) anoncu baldaŭan ekpublikigon de Esperanto-kurso. La kurso komenciĝos fine de aŭgusto 1975, kaj finiĝos en februaro venontjare. La anoncon de la kurso, kiun oni reklamos en ĉiu numero ĝis junio ĉi-jare, akompanis serioza artikolo pri la lingva problemo.
- Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) denove aranĝos intensajn Esperanto-kursojn en lingvolaboratorio de la Universitato de Paderborn, inter la 1-a kaj la 12a de aprilo 1975. La kursoj estas ĉefe destinitaj al instruistoj. Informojn bv. peti ĉe: Esperanto, Riemkestr. 62, D-479 Paderborn, FR Germanio.

Lernolibroj

- Ni eksciis, ke prof. d-ro István Szerdahelyi, kies duvoluma lernolibro de Esperanto fariĝis unu el la internacie plej popularaj lerniloj, nuntempe okupiĝas pri pretigo de lernolibro por la parolantoj de la svahila lingvo en la orienta Afriko. La nova lernilo de la Internacia Lingvo estas projektita tiel, ke ĝi estu adaptebla ankaŭ por la parolantoj de aliaj grandaj afrikaj lingvoj.

Lingvistiko

- Lingvista Rondo de Sarajevo, Jugoslavio, fine de decembro 1974, dediĉis unu el siaj regulaj sesioj al Esperanto. Pri la temo "Fenomeno de Esperanto", kiun enkondukis s-ro Senad Čolić, estiĝis pli ol 2-hora

Bugge-Paulsen

- Okaze de sia 80a datreveno, la akademiano Rolf Bugge-Paulsen, multjara prezidanto de Norvega Esperantista Ligo, komitatano de UEA kaj plenuminto de multnombraj taskoj kaj funkcioj en la nacia kaj internacia Esperanto-movado, en decembro 1974, estas proklamita kiel Honora Prezidanto de NEL. Tiuokaze, aparta delegacio de NEL vizitis s-ron Bugge-Paulsen en lia hejmo kaj transdonis al li specialan diplomon pri la honora prezidantiĝo.

Tonkin

- Fine de 1974, antaŭ ol veni al Eŭropo, interalie pro la Estrarkunsido de UEA (v. aliloke en ĉi tiu numero de la revuo), la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, faris tra Usono longan ofican vojaĝon, kiun li utilis ankaŭ por movadaj celoj. Li havis duonhoran intervjuon en unu el la ĉefaj radio-stacioj de Philadelphia, renkontiĝis kun lokaj esperantistoj en Buffalo kaj Rochester (ŝtato Novjorko), kie li ankaŭ intervjuiĝis en televido kaj ĵurnalo. La 7an de decembro d-ro Tonkin prelegis en la loka Esperanto-klubo de San-Francisko, kaj du tagojn poste en la tiea universitato. Li intervjuiĝis pri Esperanto

diskuto. La lingvistoj, ĉefe profesoroj ĉe la loka Filologia Fakultato, ne klopodis kaŝi surpriziĝon pri la kompetenteco per kiu oni en la Esperanto-movado traktas la lingvan problemaron de la nuna mondo. Ili estis aparte impresitaj per la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*.

Turismo

- Pola Esperanto-Asocio eldonis 16-paĝan broŝuron *Turisma Esperanto-Kalendaro 1975*, kiu enhavas detalojn pri 44 turismaj aranĝoj okazontaj dum ĉi tiu jaro. La broŝuron oni povas ricevi kontraŭ 1 int. respondkuponon ĉe: Klubo "Esperanto", str. M. Curie-Skłodowskiej 10/4, PL 85094 Bydgoszcz. Ankaŭ la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio eldonis plurajn belaspektajn turismajn reklamilojn ĉefe pri siaj multnombraj aranĝoj en 1975.

Persone

ankaŭ en ĵurnalo de San-Mateo (Kalifornio) kaj prelegis en la Esperanto-klubo de Ĉikago.

Santos Matias

- D-ro Alberto dos Santos Matias, portugala diplomato, kiu antaŭe postenis interalie ankaŭ en Ekvadoro kaj Pakistano, antaŭ nelonge estas nomita kiel ambasadoro de Portugalio en Greklando. D-ro Santos Matias estas jam dum pli ol dek jaroj membro-abonanto de UEA. En sia nova laborloko, la ambasadoro Santos Matias ligis bonajn kontaktojn kun la Helena Esperanto-Asocio.

Harry

- Ekde februaro ĉi-jare, la aŭstralia ambasadoro Ralph Harry translokiĝos el Bonn (FR Germanio) al Novjorko, kie li reprezentos Aŭstralion kiel ĝia ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

Wensing

- La ĝenerala sekretario de UEA, s-ro E.L.M. Wensing, fine de januaro 1975 forveturis al Aŭstralio, kie li restos ĝis la fino de marto. Lia adreso dum tiuj monatoj estos: E.L.M. Wensing, P.O. Box 297, Batemansbay, N.S.W. 2536, Aŭstralio.

N-ro 486, 1974-12-31

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

JAP: Ivao Katoo. NED: A. Laverman. NORV: Margrete Landmark.

MEMBRO-SUBTENANTO 1974

BRAZ: 232 Jair R. Peixoto Laguna.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

NED: 12 H.C. Luyke. BELG: 13 Jules Verstraeten.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-04-15 neniun membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BRIT: Brian Barker, D, JD, FD Maldon. FRG: C. Trésorier, FD Göttingen; Otto Rösemann, FD Hannover; Dieter Kleemann, FD Muggensturm. JUG: Imšir Mešan, FD Bugojno. NED: Ch. M.N. Op't Roodt, FD Den Haag; H.J. Appelo, D Tilburg. NOV-ZEL: Dennis B. Pease, FD Auckland. SVISL: S. Simeonov, FD Genève. US: Angus Pearson, VD Austin; R. Dumain, VD kaj FD Buffalo; Minerva Rees, D Foster City; Michael Ham, D Iowa City; William A. Shanks, D Miller Place; Robert Couch, D Palmer; L. Prehn, D kaj FD; Ella Gibson, VD Palo Alto.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto:

BRAZ: Manaus. BRIT: Ipswich, FD (religio). BULG: Sofio, FD (fervojoj: elektraĵoj). FRANC: Nyons. FRG: Brilon; Karlsruhe, FD (medicino); Middelsfähr; Stockheim; Stockum; Stuttgart la D; Wilhelms-haven. HISP: Barcelona, FD (asekuro) kaj (komerco); Sevilla, VD kaj FD (edukado). KAN: Burnaby, D. NED: Alkmaar, VD kaj FD (filozofio) kaj (psikologio); Arnhem, JD; Bergen; Den Haag, FD (laktoproduktaĵoj); Leiden, VD; Papendrecht; Schiedam, JD; Vlaardingen, D kaj FD (fotografio).

POLL: Białystok, FD-oj. SUD-AFR: Kaapstad, FD (religio). SVED: Avesta. URUGV: Montevideo, FD (lingvoj) kaj (muziko). US: Austin, VD kaj JD; Columbus, VD, FD (edukado) kaj (astronomio); Covina; Oswego.

DONACOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Svedio: Leif Holmlund 100,—. Sumo ĝisnuna 7492,33.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: "N.N." 100,—. Sumo ĝisnuna 455,51.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: M. Halvelik 5,50; Roger Seyen 100,—. Finnlando: Irja Klemola 58,10; E. Mänty 23,80; Aarna Ratalahti 18,90. FR Germanio: G. Kalicinski 20,—; Maria Vogel 7,05. Italio: A. de' Giorgi 35,25. Nederlando: I.M. F. Dijkhoff-Lenze 100,—; P.W. Rietmulder 10,—; Oficistoj de la CO 50,—. Svedio: Paul Almén 10,84; Sten G. Gustafsson 12,24; Erik Johansson 12,24; R. Nordström 421,37. Usono: J. Danke 48,28;

John Futran 25,64; W. D. O'Ryan 12,82. Sumo ĝisnuna 3630,91.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: A. G. Browne 64,34. FR Germanio: Georg Kalicinski 21,50; Otto Peine 31,18; Robert Schöner 1,05. Institucio Hodler "Subvencio-riparo de domfasado" 1000,—. Jugoslavio: S. Crnić 15,25. Kanado: Dorothy Hawley 255,—; Alice L. Maier-Bevel 18,47. Svedio: G. Anderson 45,—; B. Fingalsson 12,04; W. Malmsten 12,04; Gunnar Mattsson 12,04; Vera Wahlberg 4,28. Svislando: E. Albertini 1,83; Nerina Gessaga 36,61; Hella Huber 1,83; E. Jayet 3,91; Niklaus Weiss 1,83. Sumo ĝisnuna: 6004,59.

TEJO PATRONAJ MEMBROJ A: 28 Sergio Martina, Italio.

PROPAGANDA KONTO: Danlando: Gunnar Jorgensen 88,22. Sumo ĝisnuna 839,18.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: A.M. Slot-v.d. Meulen 75,—. Sumo ĝisnuna 7572,71.

DONACOJ 1975 (Gld.)

TEJO PATRONAJ MEMBROJ A: 1 R. Nordström, Svedio; 2 J. Muller, 3 Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando; 4 Frank Swift, Nov-Zelando; 5 Joel Vilkki, Finnlando; 6 Kurt Greutert, 7 E. Muster, Svislando.

Poŝtmarkojn sendu al CO!

Eksiĝis nia multjara kunlaboranto kaj komisiito pri poŝtmarkoj, s-ro Peter Zacho (Kopenhago). Estas nun serĉata nova kunlaboranto, kiu povos transpreni tiun komision, disvendi por UEA la uzitajn poŝtmarkojn, kiujn donacas la membroj tra la mondo. Ĝis ni anoncos la novan komisiiton, ĉiuj kontribuantoj de poŝtmarkoj **bonvolu sendi ilin rekte al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.**

Dum 17 jaroj, la sindona kaj faksperta laboro de s-ro Zacho kaj de diversaj liaj helpantoj havigis al la Asocio regulan financan subtenon, kiu tra tiuj jaroj sumiĝis verŝajne dudek ĝis tridek mil guldenojn kaj en la lastaj jaroj regule superis 3000 gld. jare. S-ro Zacho ne simple kolektis kaj forvendis la poŝtmarkojn sed zorge purigis ilin,

kompletigis el ili seriojn, elserĉis aparte maloftajn kaj valorajn, negocis kun filatelitoj kaj pacience atendis la plej favorajn kondiĉojn por vendo. Ĉi tie ni esprimas al s-ro Zacho, al ĉiuj liaj helpantoj kaj al ĉiuj membroj, kiuj ĝis nun kontribuis al la poŝtmarka agado, nian plej varman dankon.

En la pasinta financa jaro 1974, tiu agado havigis al UEA pliajn 1557,68 guldenojn. En 1974 la plej valoraj kontribuoj estis tiuj de s-ino E.H. Franseen (Usono), s-ro A. Garcia Breque (Argentino), s-ino M. Frizzel por la nov-zelanda movado, Oomoto (Japanujo) kaj s-ro Jean Ploug (Francujo). Al ili ni sendas kiel malgrandan dankesprimon libropremion. Se inter la legantoj de ĉi tiuj linioj troviĝas membroj filatele spertaj, kiuj estus pretaj transpreni tute aŭ parte la laboron de s-ro Zacho, ili bv. anonci sin al la Centra Oficejo.

Nekrologoj

H. DRESSELHAUS 1896-1975

La 4an de januaro, en Schloss-Holte, FR Germanio, mortis s-ro Heinrich Dresselhaus, multjara membro kaj dum la lastaj 25 jaroj delegito kaj fakdelegito de UEA. Li estis verva kaj konata aktivulo en sia regiono.

MARCEL LEMME 1908-1975

En la aĝo de 67 jaroj, en Lieĝo forpasis la 16an de januaro s-ro Marcel Lemme, delegito de UEA en tiu urbo. Li lernis Esperanton jam en la jaro 1928 kaj multe aktivis en la Movado funkciinte, interalie, ankaŭ kiel administranto de Belga Esperanto-Federacio.

Z. ŜIBAJAMA 1894-1974

La 29an de aŭgusto forpasis unu el la renomaj Zen-majstroj de Japanio,

Ŝibajama zenkei, abato de la templo Nanzenĝi en Kioto. Li verkis multe pri Zen, kaj tradukoj de liaj eseoj aperis ankaŭ en okcidentaj lingvoj (*A flower does not talk; Zen in Gleichnis und Bild*). Esperantisto de 1924, li fondis en 1931 Japanan Budhanan Ligon Esperantistan kaj kelktempe redaktis ĝian organon *La Lumo Orienta*. El la ĉina li tradukis Esperanten la verkon de la ĉina Zen-abato K'uoan (12a jc.), *La dek bildoj de bovpastado*, 1930. Krome, li i.a. kompilis bibliografion de budhismaj verkoj en Esperanto (en *La Revuo Orienta*, 1934).

HENRI SIELENS 1915-1974

La 19an de decembro 1974, mortis s-ro Henri Sielens, direktoro de la Internacia marista domo en Antverpeno. Li jam en sia juneco lernis

Esperanton de F. Schoofs, fondinto de la antverpena Esperanto-klubo, kaj neniam ĉesis aktivi en la Movado. En 1953, li kunorganizis la Unuan Beneluksan Esperanto-Kongreson, kaj en 1960 li estis vicprezidanto de la LKK de la 45a Universala Kongreso en Bruselo. Kun alia elstara belga esperantisto M. Jaumotte, forpasinta en 1970, s-ro Sielens havis decidajn meritojn por la unuiĝo de la belga Movado. Li estis honora vicprezidanto de la antverpena klubo kaj de la Belga Esperanto-Federacio.

H.J. BLOKKER 1900-1974

Post longa malsano, la 15an de decembro 1974, forpasis Hermanus J. Blokker, kiu lernis la Internacian Lingvon jam en la jaro 1915. Dum tiuj preskaŭ ses jardekoj en la Esperanto-movado, s-ro Blokker interalie estis redaktoro de la iama *Holanda Esperantisto* kaj prezidanto de la landa asocio de UEA en Nederlando LEEN

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondas nur la anoncantoj.

Oferto: Esperanto-poŝtmarkoj, Jugoslavio, 1953, 300 Din. neuzita 450,— DM, stampita 500,— DM; Triesto stampita 100,— DM. Neussner, Dominicusstr. 25, D-1 Berlin 62.

LA TORNISTRO (bona distro) n-roj 1, 2 kaj 3. Varia enhavo ilustrita: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, kotopo. 52p. 22cm. Prezo: po 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ po 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.

Fraŭlino, kiu suferas pro multobla sklerozo, kaj kiu mem ne plu kapablas skribi, estus feliĉega tamen ricevi leterojn ĉiulandajn. Kiu volas, ne postulante respondon, de tempo al tempo skribi al ŝi, sin direktu al: Mieke Demaertelaere, MS-Centrum, van Heylenstraat 16, B-1910 Melsbroek, Belgio.

12-jara denaska esperantistino deziras korespondi kun samaĝuloj tutmonde: Olja Paŝĉenko, Volkova 5a, kv. 89, SU - 644064 Omsk, Sovet-Unio.

Plenuminte peton pri kristana literaturo, ni ofte ne aŭdas de la petinto. Ĉu konfiskado? Se vi povas ricevi, skribu denove! Esperanto-Misio, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Instruista kaj muzikema esperantlingva familio serĉas helpantinon 16-17 (ev. 15)-jara, bone parolantan Esperanton, por dommastrumi kaj okupiĝi pri 3jara knabo ekde la 15a de aŭgusto 1975. Ni loĝas en la elementa lernejo, entenanta 2 klasojn, kie ni laboras. Tiu ĉi troviĝas meze de paŝtejoj, 13 kilometrojn oriente de la Chaux-de-Fonds, je 1150 m de alteco, en la kamparo. Ne estas vilaĝo, sed nur disaj domoj. Veturado al la urbo daŭras 15 minutojn. Familia etoso garantiata. Skribu al: Familio Olivier Tzaut, CH-2610 Mont Soleil, Svislando. Tel.: (039) 41 10 03.

Tute neatendite mortis nia kara filo, frato, bofrato kaj onklo KASPAR FRANS en la aĝo de 39 jaroj. Groningeno, 9 nov. 1974. Nome de la familio: B. Frans, Hoogezand, Nederlando.

Kolektanto de Esperantaĵoj, Bedřich Motálek, CS-798-45 Suchdol via Prostějov, Ĉeĥoslovakio, sopiras korespondi. Skribu baldaŭ kaj multe!

Por ĉiuj viaj presaĵoj (i.a. broŝuroj, lernolibroj) senpagan oferton volonte faros *Grafika Studio Nevan*, West-Sidelinge 198, Rotterdam-8, Nederlando.

Ekslibrisojn kaj literaturon pri tiu arto: albumojn, katalogojn k.s. en kiu ajn lingvo interŝanĝas Metodi Panĉev, Persenk blok 16-II, Sofia 7, Bulgario.

Mondpaco estas ĉies afero! Helpu la Pacmovadon! Sendu nur 8 int. respondkuponojn por 30 bildkartoj "Paco", uzeblaj por korespondi. Focht Sándor, H-5700 Gyula, P.R. Hungario.

HELSINGØR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.–26. de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti – kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør, Danlando.

Se vi ne scias kiel havigi verkojn de nobelpremiitoj en Esperanto...

ALIĜU AL IKS-LIBROKLUBO!

En 1975 estas preparataj la plej famaj prozverkoj el la pasinta 1–2-jara monda librosezono, en amplekso de ĉ.900 paĝoj, en la kadro de **FURORO-SERIO 1975:**

1. Heinrich Böll (germana nobelpremiito 1972): "Novelaro"
2. Patrick White (aŭstralia nobelpremiito 1973): "Novelaro"
3. Miguel Angel Asturias (gvatemala nobelpremiito 1967): "Sinjoro prezidanto", romano
4. Miroslav Krleža (kroata ĉefverkisto): "Rande de l' saĝo", romano.


Abono por IKS-libroklubo 1975: 4,5 sv.fr. aŭ egalvaloro. Kompleta abonkosto de **FURORO-SERIO 1975: 40 svisaj frankoj.**

La antaŭpagon de entute 24,5 sv.fr. bonvolu sendi al la bankkonto de **INTERNACIA KULTURA SERVO, 32000-009-488** ĉe Privredna banka Zagreb, Jugoslavio, plej malfrue ĝis la 1-a de junio 1975. La reston vi pagos post la ricevo de la libroj.

ESPERANTO-KLUBO "UNUECO" EN

KROMMENIE

(Nederlando) organizos denove de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1975 la 21an Internacian Ferio-Semajnon. Vi gastloĝos senpage ĉe esperantistaj familioj. Vi pagas nur por la ĉiutagaj ekskursoj, 165 ned. gld. Limdato de aliĝo: la 1-a de junio 1975. Informoj ĉe la sekr. B. v.d. Pol, Teresjkovastraat 15, Krommenie, Nederlando.



Librohelpo

En la kadro de la resanigado de la financoj de UEA, la nombro de salajrataj oficistoj en la Centra Oficejo estas reduktita de 10–11 en 1974 al nun jam nur 7. Unu sekvo de tio estas, ke la Libroservo de UEA ne plu havas apartan tuttagan oficiston.

Se, sub tiuj novaj kondiĉoj, la Libroservo funkcios malpli rapide ol kutime, ni fidas je la bonvola komprenemo kaj pacienco de la mendantoj.

Ekzistas du manieroj, en kiuj vi, la klientoj de la Libroservo, povas helpi ĝian pluan glatan funkciadon.

Unue, ni rekomendas al ĉiuj, ke ili turnu sin unuavice al sia loka aŭ landa libroservo, se tia ekzistas. Siavice, tiuj libroservoj povos mendi pli grandkvante kaj ekonomie ĉe la Libroservo de UEA.

Due, bonvolu laŭeble kunigi la mendojn kaj mendi, ekzemple, en unu fojo kvin librojn anstataŭ sendi kvin apartajn mendojn po unu libro.

Por doni iom fortan motivon al tio, la Libroservo de UEA enkondukas ekde la 1-a de marto 1975 **MINIMUMAN MENDOSUMON** de 15 guldenoj.

Mendoj je malpli grandaj sumoj estos resenditaj.

Helpu nin servi vin pli ekonomie!



Rapidinde!

Kompletaj binditaj fotokopioj haveblaj:

La libroservo de UEA disponas pri po kelkaj fotokopioj (kserografiaj) de la ĉi-sube listigitaj verkoj. La verkoj estas ĝenerale kopiitaj po 2 paĝoj kaj binditaj plaste. La originalaj eldonaĵoj delonge ne plu estas aĉeteblaj. Prezoj estas en guldenoj. Aldoniĝas 10% por la sendokostoj kaj, por Nederlando, 4% por imposto.


<i>Baha'u'llah kaj la nova epoko</i> 191p	30,60
<i>Biblio, La 8 malnovtestamentaj libroj en</i> tr. de Zamenhof, eld. Hachette, 750p	130,30
<i>El parnaso de popoloj</i> Grabowski 228p	18,70
<i>Enciklopedio de Esperanto</i> pli ol 600p	138,00
<i>Esperantisto, La n-roj</i> 49-66, 1894-95	44,00
<i>Esperanto</i> red. Hodler, 1911 aŭ 1912	120,40
<i>Eterna bukedo</i> tr. Kalocsay 351p	54,60
<i>Infero, La</i> tr. Kalocsay, ilus. ĉ. 300p . . .	49,40
<i>Robinsono Kruso</i> Defoe, 1908, 143p . . .	12,80
<i>Se grenereto</i> . . . K. Robinson, 158p	25,00
<i>Sinjoro Tadeo</i> tr. Grabowski, ilus., 334p	30,00
<i>Statistiko de 50 000 tekstvortoj</i> Blaas	12,50
<i>Verdaj donkiĥotoj</i> Baghy, 1933, 221p	17,95

Feriu en la ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé (Francujo)!
En famkonata turisma regiono, en bela, komforta kastelo, meze de parko 17ha., en amika etoso, vi scios kio estas Esperantujo!

PROGRAMO 1975

Paskaj ferioj: 1) De la 22a de marto ĝis la 29a de marto: RENKONTO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ el diversaj landoj (infanoj 9–13-jaraj akompanitaj) Kursoj, diversaj aktivaĵoj. POR PLIAĜULOJ: "Pedagogio de Esperanto" – Paroladoj, debatoj, kursoj, distraj vesperoj. 2) De la 30a de marto ĝis la 5a de aprilo: PRAKTIKO KAJ ESPRIMADO – praktiko de la lingvo, gramatiko kaj esprimado.
Somero: 1) De la 1-a ĝis la 21a de julio: ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ – trigradaj kursoj, ekzamenoj, manlaborado, ekskursoj kaj vizitoj, distraj vesperoj. 2) De la 22a de julio ĝis la 11a de aŭgusto: INTERNACIAJ SEMAJNOJ – prelegoj, diskutoj, distraj vesperoj, ekskursoj. 3) De la 12a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro: STUD-SEMAJNOJ – trigradaj kursoj, ekzamenoj, manlaborado, ekskursoj kaj vizitoj, distraj vesperoj.

Rapida aliĝo konsilinda al:
ESPERANTISTA KULTURDOMO,
Kastelo Grésillon, F-49150 BAUGÉ (Francujo)
Poŝtkonto Nantes 1485 39. Bankkonto: B.N.P.
Baugé 11098.



Amo estas fako, kiun necesas lerni – ABZ de amo estas la lernolibro.

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledimita plasto.
Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj.
Mendu ĉe: UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

